

LEGOLIBRETO VI.

por karaj amikoj, kun helpo de Milada Kolářová kaj Karel Votoček
preparis el diversaj fontoj

Jindřiška Drahotová
drahotova@esperanto.cz

2010

Aŭguraĵo

„Mi dezirus esti lektoro de Esperanto,” diris lernanto al instruisto.

„Ĉu vi estas preta por esti ĝis via kvardekkvinjaraĝo konsiderata komika, nekomprenata, nekompetenta kaj kritikata?”

„Jes, sed diru al mi, kio okazos post miaj kvardek kvin jaroj.”

„Vi al kutimiĝos.”

Pura amo

Juna virino stiris atenteme aŭtomobilon, ĉar ĝi estis tute nova, ĵus antaŭ du tagoj aĉetita. Geedzoj longe ŝparis pro la aĉeto. Sur ŝtopita kruvojo la virino ekhezitis kaj puŝis per kotŝirmilo al bufro de alia aŭtomobilo. Ŝi ekploris: kiel ŝi klarigos la okazon al la edzo? La ŝoforo de la puŝita aŭtomobilo ne sakris, sed postulis, ke oni devas skribi protokolon pri asekura okazo. La virino ekserĉis dokumentojn en granda bruna sako. El ĝi elfalis folieto kun firma vira skribo: „En okazo de akcidento memoru, ke mi amas vin, ne la aŭtomobilon.”

Gŭanehej kaj Gŭagŭan

Kuba popola fabelo – Marin Bacev

Iam vivis arbohakisto, kiu havis du hundojn. Ili nomiĝis Gŭanehej kaj Gŭagŭan. Ĉiufoje, kiam li iris por labori, li ligis la hundojn hejme kaj diris al sia edzino: „Se vi vidos, ke la hundoj estas maltrankvilaj, karesu iliajn dorsojn per balailo kaj lasu ilin liberajn.“

Iutage la arbohakisto iris haki arbojn sur la proksiman monton. Post kiam li eliris el sia hejmo, lia edzino iris viziti sian najbarinon, kun kiu ŝi volis babilo. Subite aperis fortega ŝtormo, ektondris kaj la fulmo trafis arbon, kiu estis hakata de arbohakisto. La arbo kliniĝis kaj falis sur lin.

En tiu momento Gŭanehej kaj Gŭagŭan, kiuj estis ligitaj, komencis boji kaj hurli maltrankvile. Ili komencis tiri sin, provante deŝiri la ŝnuron, per kiu ili estis ligitaj. La edzino estis ankoraŭ ĉe najbarino kaj ne aŭdis bojadon. Tamen, finfine la edzino ekaŭdis bojadon de la hundoj kaj tuj iris liberigi ilin. La hundoj kiel sagoj ekkuris direkte al la loko, kie estis ilia mastro premita al la tero de la arbotrunko. Tiam komencis Gŭanehej kaj Gŭagŭan eltiri la mastron el sub la arbotrunko. Poste ili ordigis la unuopajn korpopartojn kaj kungluis ilin. Kaj post ili vivigis lin per viviga akvo. Kiam ili faris ĉi tion, la hundoj diris al la mastro: „Ni plenumis nian devon, sed ni ne revenos hejmen, ĉar la mastrino ne karesis niajn dorsojn per la balailo.“ Tiel ili diris kaj forkuris.

Kaj ekde tiam ĉiufoje, kiam estas ŝtormo aŭ tempesto, ĉiuj hundoj estas maltrankvilaj kaj hurlas.

La UK en la jaro 2010 okazis en Kubo.

Konsilo bona ĉiam bonvena

Por helpo al neprofesiuloj.

Elektu interesan artikolon kaj imagu, ke vi ĝin laŭtlegas al via malsana, preskaŭ blinda kaj sufiĉe surda avino; ŝi jes ja havas tute klaran menson kaj scivolemas pri ĉio... Ar-ti-ku-lu bone kaj elparolu bele! (Kaj ĝenerale, provu ofte laŭtlegi.)

Rigardu la enhavon kaj elektu tiun artikolon, kies titolo inspiras aŭ surprizas vin; antaŭ ol legi la artikolon, imagu ĝin: antaŭpensu la ideojn, kiuj verŝajne estos prezentataj kaj notu viajn pensojn; listigu dek vortojn, kiuj devus esti uzataj en la artikolo; sekve, kontrolu kaj donu al vi mem po unu poento por ĉiu divenita vorto; se vi havas pli ol kvin poentojn, premiu vin per taso da teo, peco de muziko aŭ per alia artikolo.

Elektu mallongan interesan artikolon kaj notu unu ŝlosilvorton el ĉiu frazo; post tio provu reverki la artikolon (ne gravas se vi ne laŭvorte reproduktas la frazojn; gravas redoni la esencon de la ideoj kaj faktoj).

Legu mallongan amuzan novaĵon kaj rakontu ĝin al samideano (ĉu dum kunmanĝo, ĉu tra la reto); alia variaĵo estas trovi la amuzaĵon en nacilingva gazeto kaj traduki ĝin al Esperanto... kaj kompreneble sendi al www.edukado.net por Monda Mozaiko!

Legu artikolon, kiu interesus alian esperantiston, notu ĉiujn interesajn faktojn kaj kreu 'kvizon' por testi liajn konojn.



Svede kaj eksterlande

de Siv Burell

Leginte «Mi nur volas plendi» en la blogo de Cindy McKee mi retrovis malnovan tekston el «La mondo en la lernejo». Ŝajnas, ke la du tekstoj havas similan mesaĝon. La mia estas malnova sed tamen ĝi ankoraŭ aktualas. En ĉiu lando troviĝas naciismo – bedaŭrinde.

Olsson estas svedo. Pri tio li fieras. Eksterlandanoj estas stranguloj. Ili parolas strange, manĝas strangan manĝaĵon kaj havas misterajn religiojn. Svedio ne bezonas la eksterlandanojn.

Tiel pensas Olsson, kiam li vekiĝas en sia lito, invento de Azio. Li ellitiĝas kaj rigardas sian lanan kovrilon de Aŭstralio kaj siajn litotukojn el kotono de Sudano. Li demetas sian piĝamon, kiu origine estas vestaĵo el Hindujo. Li metas siajn piedojn en la pantoflojn, indianan inventon. En la banĉambro li lavas sin per sapo, kiel la araboj instruis nin. Li razas sin – tio estas ritualo de malnova Mezopotamio. Jen li eniras la kuirejon kaj rigardas tra la fenestro. Estis la egiptoj, kiuj inventis vitron. Oranĝa suko de Cipro, kafo de Etiopujo, sukero de Kubo... Olsson legas... literojn, kiujn iamaj semitoj konstruis sur papero, unue fabrikita de ĉinoj per tekniko, kiun la germanoj poste perfektigis. Pluvas. Olsson malfaldas ombrelon. En Hindujo oni unue uzis ĝin.

Poste Olsson kondukas sian usonan aŭton al la laborejo. Li estas ĝoja kaj feliĉa esti tiel bona homo. ”Dankon, kara Jesuo”, li pensas, sendante dankon al judo, kiu malofte interrilatis kun memkontentaj homoj.



Siv Burell diras:

Kara Jindriska! Kompreneble vi rajtas uzi por vi uzeblajn partojn el mia blogo. Kunlaboro ĉiam bonas.

Majo 2010

CERBAJ IMPULSOJ

1. Samideanoj estas feliĉaj homoj, ĉar sufiĉas, ke unu pensas por ĉiuj.
2. Guto malgranda konstante frapante kaŭzas – kapdoloron.
3. Ne ekzistas plu timo de la fluganta, sed de la malplena telero.
4. En vanaj promesoj ĉiam superfluas espero.
5. Por burokrataj vermoj la ŝtata pomo estas – paradiza.
6. Suspektindaj estas «pacaj» batalantoj kiuj uzas glavojn soifantajn.
7. Nigra ĉemizo estas senmalica, se ĝi estas nigra de malpuro.
8. Ekzistas popolgvidantoj kiuj estas senmortaj nur dum ili vivas.
9. Laŭ posedkvadratoj de loĝejo ni estas dividitaj je: loĝantoj, kunloĝantoj, subloĝantoj kaj – senkvadrataj loĝantoj.
10. La mondo estas pli bone videbla sur la socia ol sur la geografia karto.

03.04.2000.

Dinko Matkovic – Insulo Hvar

El la libreto „Monatoj tra la Mondo“

grupo de aŭtoroj „Ĉenraporto“ 2005, eldonejo HORIZONTO en Japanio

Aŭgusto

Michel Sanson – micmin2@wanadoo.fr

En aŭgusto la taglumo malkreskas grade, sed estas multe da turistoj, eĉ pli multe ol en julio, apud la marbordoj.

Pri la nomoj de monatoj en Francio, ĉu vi scias, ke nelonge post 1789, komencjaro de la franca revolucio, la revolucia registaro decidis ŝanĝi la sistemon de la kalendaro (ekuzita en oktobro 1793). Jen estas tiu nova sistemo:

La jaro enhavas 12 monatojn.

La monato havas 3 semajnojn.

La semajno enhavas 10 tagojn.

Do, $12 \times 3 \times 10 = 360$. Ili aldonis 5 tagojn por havi 365 tagojn en unu jaro. (Estis iu alia regulo por superjaro.) Tiuj 5 nomataj „sanculottides“ estis feriaj tagoj.

Jen la nomo de monatoj:

Nivose, Pluviose, Pentose,

Germinal, Floreal, Prairial,

Messidor, Thermidor, Fructidor,

Vendemiaire, Brumaire, Frimaire.

Aŭgusto estis Fruktidor (pro la fruktoj!). Mi estas certa, ke vi rekonas la alegorian signifon de kelkaj monatoj.

Jen nomoj de la dek tagoj:

Primidi, Duodi, Tridi, Quartidi, Quintidi, Sextidi, Septidi, Octidi, Nonidi, Decadi.

Estas evidente sed ne tre poezie!!!

Nia imperiestro, Napoleon, decidis nuligi tiun revolucion kalendaron kaj altrudis la kutiman kalendaron ekde la unua januaro 1806. Ĝis nun, ne okazis nova revolucio, do Aŭgusto estas ankoraŭ Aŭgusto. Hura por la monato Aŭgusto!!!

Junulino sur la Luno

Ĉuvaŝa popola fabelo.

Antaŭ longe-longe, en nememoreblaj tempoj, vivis sur la tero tre malicega sorĉistino. La sorĉistino havis duonfilinon – kvietan, laboreman kaj belegan. Malamis la sorĉistino sian duonfilinon, konstante kritikis, turmentis ŝin per malfacilega laboro. Sed ŝi tutegale estis same bela kaj ĉarma. Ekdiros – kvazaŭ alaŭdo ekkantos, ekridetos – kvazaŭ serena suneto ĉion ĉirkaŭe eklumigos. Al ĉiuj plaĉis la belulino, ĉiuj ŝin ŝatis. Sed tio nur pli kolerigis duonpatrinon, kaj decidis ŝi nepre pereigi duonfilinon.

Foje, en surda noktomezo, la sorĉistino alrapidis de ie ajn sur sia fera premilo, vekis dormantan junulinon kaj diris al ŝi: „Kuru al rivereto, freŝan akvon mi trinki ekvolis!”

La junulino ellitiĝis, prenis sitelojn kun sitelportilon kaj ekiris al la rivero. „Nu, vi ekiris, belulino, sed ĉu vi revenos?” pensis la sorĉistino.

La nokto estis klara, frosta. De la ĉielo lumis plena luno, sub la piedoj neĝo kraketis.

Admirante lunan brilon, la junulino malsupreniĝis al aperturo en glacio. Demetis de la vekto sitelojn, sin klinis por ekĉerpi la akvon, sed kiam ŝi rektiĝis – horore retiriĝis: de ĉiuj flankoj ŝin ĉirkaŭis teruraj sorĉistinoj. Ili flugadis ĉirkaŭ ŝi sur balailoj kaj premiloj, etendadis ostecajn manojn, klakadis per feraj dentoj. Timiĝinte, junulino fermis la okulojn, prenis sitelojn al la vekto kaj ekhastis hejmen. Sed ne facilas fuĝi! La sorĉistinoj ne malantaŭiĝadas ŝin, baradas la vojon, de ĉiuj flankoj etendadas terurajn manojn, jen-jen disŝiregos

ŝin. La junulino malesperante ĉirkaŭrigardas, sed ĉirkaŭe – neniu estas, nur unu sola Luno de la ĉielo lumas.

„Ne permesu pereji, klara Luno!” ekpetegis la junulino.

La Luno ekaŭdis la petegon de junulino, ekbrilis pli forte kaj per siaj radioj levis la junulinon kun siteloj kaj vekto al si. Kaj la sorĉistinoj jam ne povis atingi ŝin.

De tiu tempo en klaraj noktoj sur plena Luno videblas junulino kun vekto sur la ŝultroj. Fiksrigardu kaj vi nepre ekvidos ŝin.

Tradukis Sergeo Tihonov, 20.02.2003

Finfine aperis serioza argumento kontraŭ angla lingvo.

Nova scienca eltrovo:

En Japanio, kie nutraĵuzo de graso estas minimuma, la kvanto de kormalsanoj kaj koratakoj estas pli malalta ol en Anglio kaj Usono.

Sed en Francio, kie la uzo de vino kaj nutraĵgraso estas sufiĉe alta, la kvanto de kormalsanoj kaj koratakoj ankaŭ estas pli malalta ol en Anglio kaj Usono.

En Hindio, kie oni preskaŭ ne trinkas vinon, la kvanto de kormalsanoj kaj koratakoj estas pli malalta.

En Hispanio, kie oni abunde trinkas ruĝan vinon kaj ŝatas manĝi diversajn paprikgrasajn kolbasetojn, la kvanto de kormalsanoj kaj koratakoj ankaŭ estas pli malalta, ol en Anglio kaj Usono.

En Alĝerio, kie oni amaras plej malofte, estas la kvanto de kormalsanoj kaj koratakoj pli malalta, ol en en Anglio kaj Usono.

En Brazilo, kie oni vere tre ofte amaras, estas la kvanto de kormalsanoj kaj koratakoj ankaŭ pli malalta, ol en Anglio kaj Usono.

Resumo:

Manĝu kaj trinku kaj amoru laŭplaĉe! Ŝajnas, ke tio, kio mortigas, estas la angla lingvo.

Malfideleco

Benjamin Kuras, 66jara, ĉeĥa verkisto, 2010.

Dependas laŭ vidpunkto kaj kulturo en iu socio. En pratempoj povis ino rilati kun kelkaj viroj, ĉar ŝi alportadis vivon. Iam malfideleco ne ekzistis kaj iaj leĝoj pri tio mankis. Sed poste komencis viroj militi kaj reciproke murdi sin. Subite ili malnombriĝis. Por ke ino ne restu sola, la rilatoj turniĝis. Ĉar ĉiu viro volas superigi alian, do, penis akiri por si mem pli da inoj. Por ke teni ilin, oni ordonis al inoj fidelecon kaj komencis ilin posedi. Nu, poste denove plimultiĝis viroj sen inoj kaj de tio estiĝis danĝero de militoj. De tiu tempo oni militas.

Ambaŭflankan fidelecon ĝis tombo elpensis katolika eklezio – kaj aperis malfideleco. Eble pro kialo teni homojn en sento de kulpo kaj timo kontraŭ infera teruro.

Elegante solvis la problemon islamanoj. Laŭ iliaj leĝoj viro povas posedi eĉ kvar inojn, se estas sufiĉe riĉa, kaj malpermesis seksumi al viroj sen inoj, sed promesis abundan seksumadon postmorte. Tiel aperis senlima milita apetito.

El historio oni povas dedukti, ke nocio „fidelo“ estas origina kialo de ĉia milito kaj sekura vojo al paco estus nuligi ĝin. Tiel malaperus malfideleco, ĵaluzo, envio kaj ĉiuj amus ĉiujn.

Traduko: J.Drahotová.

Klepsidro

Ŝanĝema vetero devigis homojn de iliaj komencoj serĉi ilojn sendependajn de la suna lumo. Do ĉirkaŭ 1500 jarojn a.K. aperis akva horloĝo – „klepsidro“. La plej simpla funkciis per elfluanta akvo, sed oni uzis ankaŭ kun enfluanta akvo. La horloĝo havis flosileton, kiu montris tempon laŭ ŝanĝo de akva surfaco. La akvaj horloĝoj furoris en Grekio, ĉar per ĝi oni mezuris tempon de oratoraj prezentaĵoj kaj en Akademio dum epoko de Platon oni mezuris lerneajn lecionojn. Ekzistis horloĝoj, kiuj povis ekĵeti ŝtonetojn sur metalan telereton en tempintervaloj – tiel ili „batis“ la difinan horon.

En la epoko de renesanco oni jam konis mekanikajn horloĝojn, sed intereso pri la helena scienco kaj filosofio iom renovigis intereson pri „klepsidro“.

En la 19-a jarcento jam ekzistis tiel konstruitaj horloĝoj nur malofte kiel raraĵo.

JoDo.

„Ĉefuloj kondutas kiel ĉimpanzoj“

Leginte artikolon en „MFDnes“, ĉeĥa tagĵurnalo, de 14-a oktobro 2008, mi kaptis malbelan impreson.

En mallonga artikoleto kun titolo „Ĉefuloj kondutas kiel ĉimpanzoj“ oni skribis: „Laŭ la plej novaj eltrovoj de aŭstraliaj sciencistoj la ĉefuloj kondutas kiel anoj de besta regno, precipe kiel ĉimpanzoj. Sciencistoj el Universitato de Nova Suda Kimrujo (New SouthWales) observis centojn da estruloj kaj personaron kaj resumis, ke la superuloj en labora medio kondutas same kiel dominantaj bestoj, indikante sian spacon, kreante aŭtoritaton kaj manifestante sian povon.”

Estroj vestigas malhelajn kompletojn kun ĉemizoj kaj kravatoj de helaj koloroj, same kiel bestoj fieras per krie koloraj partoj de korpoj. „En naturo per tio oni allogas inon, en oficejo ĉefrolas akiri postenon en hierarkio de oficejo,“ skribas la brita ĵurnalo The Daily Telegraph.

La ĉefo de esplora teamo klarigas: „*Homo sapiens* dum 2 milionoj da jaroj evoluis en triban kaj hierarkieman unuopulon kaj li fakte sur sia biologia nivelo ne tro diversiĝas de aliaj (animalaj) specoj. Evidente ni havas tion koditan en genoj.“

Laŭ tiu ĉi scienclaboro, publicita en aŭstralia gazeto Journal of Health Organisation and Management, havas la estroj inklinon aranĝi por si pli grandajn seĝojn, paroli pli laŭte kaj pli ofte ĉesigi parolon de la alia. Sian parolon ili plenigas per ĵargono kaj fremdaj vortoj por misinformi homojn.

Jeffrey Braithweite konkludas: „Tion, kion ni trovis, estas universala animala montrado de povo, vireco, sekso kaj aŭtoritato, kiu estas profunde enradikita.”

Esperantigo de J.Drahotová



Pakumoj, pakumoj, pakumoj...

Februaro 2010, Drahotová

Pri ili oni parolas kiel pri ekologia minaco, ili konstante kreskas, eble tre stulte. Sed pakajetoj de saketoj kun teo, krom praktika kialo konservi bonodoron, surhavas belajn desegnaĵojn, kolorojn kaj surskribojn, ofte brilas kaj odoras eĉ sen teo.

Mirinda fakulino de slojdoj instruis nin tiujn beletajn paperetojn diverse distondi, kunmeti, glui kaj tiel krei nekredible interesajn bildojn, per kiuj oni povas multe diri kaj ĝojigi. Ni fabrikis multe da ili en rondo de lertulinoj en Ĉeĥa paradizo en penzono Espero kaj dissendis ilin en mondon. La unuajn, per kiuj ni lernis krei suvenirojn, servis al niaj proksimuloj kiel bondeziroj, kaj tiuj kiuj sekvis, sen troigo, iris al ĉiuj kontinentoj kun amikaj salutoj de ni – idealistoj, optimistoj, esperantoj...



El la libro „La skandalo pro Jozefo”

de Valdemar Vinař

Observante la morojn en mia nova vivmedio, mi baldaŭ ekkomprenis, ke pri la karaktero de la egipta socio estas same, kiel pri tiuj hieroglifaj surskriboj, kiujn oni situigas sur ĉiu vaka surfaco. Unue fremdulo perceptas unuopajn bildetojn de ne tre klara signifo, sed iompostiome li ellernas malkaŝi ties kontinuecon; kaj deĉifrinte aron da pentraĵetoj, oni solvas ties veran sencon kaj ekkomprenas la ideon de la skribinto. Jes, mi ellernis legi ne nur en la hieroglifaĵoj, sed ankaŭ en la animoj de miaj mastroj. Ne estas nur hazardo, ke nek tie nek jene mi trovis esprimojn poeziajn; nurnure malvarma, sobra senpersoneco enestas. La reliefaj skulptaĵoj ĉiuloke nur okulfrape akcentas

supernaturan grandecon de la superuloj, abundvorte prilaŭdante iliajn laŭdirajn virtojn aŭ heroajn farojn. Ĉio estas monstroze monumenta, rigide patosa, malsincera kaj hipokrate mensoga. Al intima poezio la egiptoj tute ne inklinas. Ĉio nur kvazaŭas. Cetere mia mastro mem – jen ja tipa ekzemplo, damne!

La Monujo

Maŝado de Asizo

Subite, Honorio rigardis la grundon kaj ekvidis monujon.

Malleviĝi, preni kaj teni ĝin estis kelksekunda tasko. Neniu lin vidis, escepte de viro, kiu estis ĉe la pordo de butikoj, kaj, sen lin koni, diris al li ridante:

- Ho, se vi ĝin ne trovus; vi poreterne ĝin perdus.

- Jes ja, konsentis Honorio hontanta.

Por taksu la favorecon de ĉi monujo, oni bezonas scii, ke Honorio morgaŭ devas pagi ŝuldon, kvarcent kaj kelkajn mil-rejsojn, kaj la monujo estis plenplena. La ŝuldo ne ŝajnas altvalora por homo de sama situacio kiel Honorio, kiu advokatas; sed ĉiuj kvantoj estas grandaj aŭ malgrandaj, laŭ la cirkonstancoj, kaj ĉi tiuj ne povus esti pli malbonaj por li. Familiaj elspezoj troaj, unue pro servoj al parencoj, poste por kontentigi la edzinon, kiun la soleco ĉiam tedis; balo iufoje, vespermanĝo aliffoje, ĉapeloj, ventumiloj, tiom da aliaj aferoj, ke ne plu estis rimedo krom iom post iom konsumi la estontecon.

Ŝuldantiĝis. Unue de la fakturoj de butikoj kaj magazenoj; poste li prunteprenis, ducent de iu, tricent de alia, kvincent de tria, kaj ĉio kostkreskante, kaj baloj okazante, kaj vespermanĝojn ĝuante, kvazaŭ senfina vortico, kavego.

- Al vi nun estas bone, ĉu ne? lastatempe estis lin demandanta Gustavo C..., advokato kaj intimulo de la familio.

- Nun jes, mensogis Honorio.

La vero estas, ke al li estis malbone. Malmultaj aferoj, de malgranda sumo, kaj maldiligentaj reprezentitoj; domaĝege li ĵus perdis proceson, al kiu li esperis fortege. Ne nur ricevis malmulton, sed eĉ ŝajnas, ke ĝi fortiris de li iom el lia jura reputacio; iel ajn, aferoj kiuj ŝimis en la ĵurnaloj.

S-ino Amelia nenion sciis; li nenion raportis al sia edzino, ĉu bonaj ĉu malbonaj negocoj. Al neniu li ion raportis. Li ŝajnigis esti tiel ĝoja kvazaŭ li naĝus sur maro de prospero. Kiam Gustavo, kiu ĉiunokte iris al lia hejmo, kutime parolis unu aŭ du ŝercojn, li tiam respondis per tri kaj kvar; kaj poste li iris aŭskulti pecojn de germana muziko, kiujn s-ino Amelia tre bone ludis per piano, kaj kiujn Gustavo aŭskultis kun neesprimebla plezuro, aŭ ili kartludis, aŭ nur babilis pri politiko.

Iutage, la edzino trovis lin kisanta la filinon, kvar-aĝan infanon, kaj vidis liajn malsekajn okulojn; ŝi miregis, kaj lin demandis, kio okazas.

- Nenio, nenio.

Oni komprenas, ke estis la timo pri la estonteco kaj la teruro pri la mizero.

Sed la esperoj tamen ĉiam revenis facile. La penso, ke pli bonaj tagoj ja revenos, tuj donis al li komforton por batali. Li estis je aĝo de tridek kvar jaroj; estis la principo de la kariero: ĉiuj principoj malfacilas. Kaj daŭre laboras, atendas, elspezas, petas fide aŭ prunte por pagi malbone, kaj je malbonaj horoj.

La hodiaŭa urĝa ŝuldo estas damnindaj kvarcent kaj kelkaj mil-rejsoj je kaleŝoj. Neniam la fakturo tiel malfruis, nek tiel kreskis, kiel nun; kaj, rigore, la kreditoro lin ne mort-minacis per tranĉilo sur lia brusto; sed diris hodiaŭ al li acidajn vortojn, kun malbona gesto, kaj Honorio volas pagi al li ja hodiaŭ. Estis la kvina posttagmeze.

Li tiam memoris iri al iu aĝiotisto, sed revenis sen riski peti ion de li. Nur post sin tredi sur la Asemblea Strato li ekvidis la monujon sur la grundo, prenis kaj enpoŝigis ĝin, kaj vojiris.

Dum la unuaj minutoj, Honorio nenion pensis; nur iris, iris, iris, ĝis la Placo de la Karioka. Sur la Placo li haltis kelkajn momentojn, - poste ankaŭ sur la Strato de la Karioka, sed tuj revenis, kaj eniris Urugvajanan Straton. Senkonscie, iom poste li sin trovis sur la Placo de S-ta Francisko de Paŭla; kaj, krome, nescie, eniris Kafeton. Petis ion kaj apogis sin je la muro, rigardante eksteren. Timis malfermi la monujon; eble li ne trovos ion, nur paperojn senvalorajn por li. Samtempe, kaj tiu estis la ĉefkialo de la pripensoj, la konscienco lin demandis, ĉu li povus uzi la monon, kiun li trovus. Ne lin demandis kun nescia karaktero, sed ja kun ironia kaj riproĉa esprimo. Ĉu li povus fruktuzi la monon, kaj pagi la ŝuldon per ĝi?

Jen la afero. La konscienco ĵus lin diris, ke li ne povus, ke li devus kunpreni la monujon al policejo, aŭ ĝin anonci; sed tuj post kiam ĝi al li diris tion, tiam ekaperis la nuntempaj angoro, kaj ili allogegis lin, kaj invitadis lin pagi al la kaleŝejo. Ili eĉ lin diris ke, se li perdintus ĝin, neniu ĝin donus al li; tia ruza konsilo lin kuraĝigis. Ĉio ĉi okazis antaŭ ol malfermis la monujon. Li ĝin elpoŝigis, finfine, sed timege, preskaŭ sekrete; malfermis ĝin, kaj ekremigis. Estis mono, multe da mono; li ne kalkulis, sed vidis du monbiletojn de ducent mil-rejsoj, kelkajn de kvindek kaj de dudek; kapkalkulis ĉirkaŭ sepcent mil-rejsojn aŭ plu; minimume, sescent. La ŝuldo finiĝus; kelkaj urĝaj elspezoj malaperus. Honorio havis tentojn fermi la okulojn, ekkuri al la kaleŝejo, pagi, kaj, kiam la ŝuldo estas pagita, adiaŭ; li repaciĝos interne. Fermis la monujon, kaj timante ĝin perdi, reenpoŝigis ĝin.

Sed tuj poste li ĝin elpoŝigis denove, kaj ĝin malfermis, volante kalkuli la sumon. Kial kalkuli? Ĉu ĝi estas lia? Finfine li sin venkis kaj kalkulis: la sumo estis sepcent kaj tridek mil-rejsoj. Honorio ekfrostotremis.

Tion neniu vidis, neniu sciis; eble tio povus esti hazardaĵo, lia bona sorto, anĝelo... Honorio veis pro sia nekredo je la anĝeloj...

Sed kial li ne devus ilin kredi? Kaj rerigardis al la mono, pririgardis, igis ĝin flui sur la manoj; poste, decidis la malsamon – ne uzi la trovitaĵon, ĝin redoni.

Ĝin redoni al kiu? Li tiam komencis vidi, ĉu estis ia signo en la monujo.

"Se estos nomo, ajn indiko, mi ne povos eluzi la monon," li pensis.

Li esploregis la monujajn poŝetojn. Trovis leterojn, kiujn li ne malfermis, falditajn leteretojn, kiujn li ne legis, kaj finfine vizitkarton; legis la nomon; ĝi estis de Gustavo. Sed do, la monujo?... Pririgardis ĝin ekstere, kaj ĝi ŝajnis al li efektive de lia amiko. Rerigardis internen; trovis aliajn du kartojn, aliajn tri, aliajn kvin. Ne eblis dubi; ja estas de lia amiko.

La eltrovo malĝojigis lin. Li ne povus ekposedi la monon, sen praktiki agon nelican, kaj, tiukaze, dolorigan al sia koro ĉar ĝi estus malprofita al amiko. La tuta kastelo konstruita falruiniĝis kvazaŭ karto-kastelo. Li trinkis la lastan guton de kafo, sen rimarki, ke ĝi estis malvarma. Eliris, kaj nur tiam rimarkis, ke preskaŭ estis nokto. Piediris hejmen. Ŝajne la neceseco ankoraŭ lin donis du puŝojn, sed li rezistis.

"Paciencon," li sin diris, "morgaŭ mi vidos, kion mi povos fari."

Atinginte la domon, jam tie li ekvidis Gustavon, iom maltrankvila kaj eĉ s-ino Amelia ankaŭ aspektis same. Eniris ridante, kaj demandis la amikon, ĉu io mankas al li.

— Nenio.

— Nenio?

— Kial?

— Metu la manon en la poŝon; nenio mankas al vi?

— Mankas al mi la monujo, diris Gustavo sen meti la manon en la poŝon.

— Ĉu vi scias, kiu ĝin trovis?

— Trovis ĝin mi, diris Honorio donante ĝin al li.

Gustavo ĝin prenis trorapideme, kaj malfide rigardis al la amiko. Tia rigardo estis laŭ Honorio kvazaŭ stileto-frapo; post tiom da bataloj kontraŭ la neceseco, ĝi estis trista premio. Honorio ridetis amare; kaj, ĉar la alia lin demandis, kie li ĝin trovis, li donis la ĝustajn klarigojn.

— Sed vi rekonis ĝin?

— Ne; mi trovis viajn vizitkartojn.

Honorio sin turnis, kaj iris ŝanĝi la tualeton por la vespermanĝo.

Tiam Gustavo tiris denove la monujon, malfermis ĝin, iris al unu el la poŝetoj, prenis unu el la leteretoj, kiujn la alia ne volis malfermi nek legi, kaj etendis ĝin al s-ino Amelia, kiu, angore kaj tremante, disŝiris ĝin je tridek mil eroj: ĝi estis amo-letereto.

Esperantigis Vitor Luiz Rigoti dos Anjos, Brazilo

La vizo

Tereza Kapista

Estis la jaro 2004. Mi ricevis invitilon por gvidi kurson dum tradicia Somera kursaro en Aŭstralio en Melburno. Mi ĝojis pro tiu invito, ĉar mi ankoraŭ ne estis en Aŭstralio. Mi iris al ambasadejo pro la vizo. Tie estas ĉio bone organizita. Sur la muro estas aparato el kiu oni eltiras ordan numeron kaj poste en salono kie estas la giĉetoj vi povas trakvile sidi ĝis kiam super la giĉeto aperas via numero, Kio signifas ke via afero estos traktota. Intertempe vi plenigas la demandliston kiu estas en angla lingvo.

Apud mi sidis homo, tre strange vestita en sandaloj, kun ege malnovmoda leda teko. Li interparolis kun virino sidanta apud li. Li fanfaronis ke jam 30 jarojn li vivas en Aŭstralio kaj nun venas rekonstrui la malnovan domon en sia vilaĝo. La virino petis lin ke plenu al ŝi la demandliston, ĉar ŝi ne komprenas la anglan. Li respondis:

- Ho! Mi ne scias skribi en la angla, nek povas pleni la demandilon, ĉar mi ne povas ĉion kompreni. Tiam mi enmiksiĝis demandante:

- Ĉu eblas ke dum tridekjara vivo en Aŭstralio vi povas nek skribi, nek legi, eĉ ne ĉion kompreni en la angla?

- Jes, eblas, mi laboras en fabriko kie mi sidas ĉe maŝino per kiu mi faras najlojn. Estas granda bruo en tiu loko kaj la kunlaborantoj ne povas interparoli. Poste kiam finiĝas la labortempo, mi havas aŭton kaj iras rekte hejmen, ekster la urbo, ĉar mi la aŭton ne ŝatas konduki tra la urbo. Ĉu vi ankaŭ vojaĝas al Aŭstralio? – li turniĝis al mi.

- Jes, mi gvidos tie kurson de Esperanto kaj restos dum 2 semajnoj.

- Ho, kara ne revenu, mi tuj povas ĉi tie en la ambasadejo subskribi al vi garantian leteron, ke mi prizorgos vin, kaj vi poste venu al mi, estu mia edzino. Mi ne estas ege postulema, mi estus kontenta nur se vi ĉiutage atendos min kun io manĝebla per kulero. Mi ŝatas la kuiritajn manĝaĵojn. Vi nenion devos labori, vi estos en domo, mi iros al laborejo kaj post reveno ni pasigos la vesperojn kune.

Mi estis vere ŝokita! Tamen afable mi trankviligis lin, ke mi tion ne povos fari, sed eble tion li proponu al sinjorino apud li.

-Ne, ŝi ne scipovas la anglan.

Do, anstataŭ ricevi la vizon mi ricevis bonan okazon edziniĝi eĉ al eksterlandano! Kia ŝanco!

En tiu ŝoko mi ekvidis mian numeron ĉe giĉeto kaj alkurante ĝin, tute ne sciis kion diri. Mi montris miajn paperojn kaj la invitleteron kaj ili ĝentile diris, ke mi venu venontsemajne. Mi rehejmiĝis kaj tiam denove legis miajn dokumentojn kaj konstatis, ke mi devas estis en Aŭstralio post 8 tagoj. Mi tiam vidis ke tio tute ne eblas, ĉar mi ne povos atingi Melburnon ĝustatempe, se mi devos atendi pluan unu semajnon pro la vizo. Mi skribis al Aŭstria Esperanto Ligo, ke bedaŭrinde mi ne povos esti ĝustatempe tie pro la vizo.

Kaj la mirakla komputilo helpis! Samvespere mi ricevis mesaĝon ke mi morgaŭ iru al la ambasadejo kaj estos ĉio en ordo. Kiel eblas? Ĉar la prezidanto de AEL estas eksa Ministro por eksteraj rilatoj en UN-o, Ralph Harry.

Tuj matene mi iris tien, sed ili nenion sciis pri mia vizo. Nature mi aliris la saman giĉeton kie hieraŭ mi estis. Mi ekŝvitis. Tamen, mi ne sukcesos! Tute hazarde aŭdis mian nomon la juna oficisto de apuda giĉeto. Alvokis min kaj donis al mi la pasporton kun la vizo kaj eĉ diris, ke mi ne devas pagi la vizon (kiu kostis 100 \$).

Mi do, denove ankaŭ kun ŝoko eliris el la ambasadejo. Hejme mi malfermis la pasporton kaj konstatis ke mi ricevis OFICIALAN VIZON por oficiala vojaĝo. Mi ne povis kredi. Mi jam estis en multaj landoj sed tio ne okazis. Poste mi informis AEL ke mi ricevis la vizon, kaj ke la flugbileto kostas ĉ. 1000 \$. Ili tute leĝere respondis:

-Vi pagu kaj ni repagos ĉi tie la sumon al vi.

Ho, Dio, de kie mi povus havi 1000 \$ en tiu krizo, kiel emeritulo kun 80 \$ monata pensio! Denove la komputilo estis la sola helpilo, mi skribis al ili:

- Kvankam nun mi la vizon havas, sed monon absolute ne havas por la flugbileto, nek konas iun ajn, kiu povus pruntedoni al mi. Tia alta sumo estis, neimagebla en tiu ĉi periodo ĉe ni.

Post 1 tago mi ricevis telegramon, ke mi iru al banko, ĉar alvenis pere de Wester Union mono al mi. Mi ne kredis ke tio eblas. De la poŝtejo mi rekte iris al avioagentejo kaj aĉetis la bileton, kaj post 2 tagoj mi forflugis al longega vojaĝo, al alia flanko de la mondo.

Kiam mi alteriĝis en Melburno mi timegis, ke tiu mia vizo de *oficiala vojaĝo* ne estu suspektinda. Sed por oficialaj vizitantoj ekzistis tute alia eliro kaj neniu rigardis min, nur oni stampis la pasporton kaj salutis min. Tamen kiam mi atendis mian valizon, alvenis vere eta hundo kaj flaregis mian mansakon. Post ĝi alvenis sinjorino kaj petis, ke mi malfermu la pakaĵon. La hundeto sursaltis kaj komencis elfosadi ĉion per la antaŭaj piedoj, ĝis kiam ĝi trovis paperan sakon kun duonkilogramo da sekaj figoj. La sinjorino montris al mi la informilon, kiun oni enmetis en la pasporton ĉe nia flughaveno. Estis klara indiko, ke nenium manĝaĵon kaj likvajn objektojn, semojn ktp. oni rajtas enporti. Ŝi montris al mi la klaŭzon, kie estas indikita la punsumo kiun oni devas pagi, se estas trovita io malpermesita ĉe la vojaĝanto.

Ŝi petis mian pasporton kaj kiam vidis la vizon por oficiala vojaĝo, ŝi kun agrabla rideto redonis la pasporton, forprenis la figojn, kaj forgesis pri la puno.

Ĉe flughaveno atendis min s-ro Kanaĉki, serbo, kiu vivas tie jam pli ol 50 jarojn. Li estas kunlaboranto en radio elsendo 3ZZZ, kiu elsendadas en Esperanto. Tio estis agrabla surprizo. En la kursejo mi persone konatiĝis kun s-ro Ralph Harry, tre agrabla homo, mi dankis por lia interveno, ĉar sen ĝi mi tute ne povus veni.

Hodiaŭ la 19an de decembro estas la tago kiam Serbio akiris la senvizan liberigon. Do, mi ĝojegas, sed mi ne plu havos okazon havi oficialan vizon.

PS: mi havas kelkajn pasportojn plenplenajn de vizoj, ĉar ni devis havi ne nur vizon por la vizitota lando sed ankaŭ transirajn vizojn tra aliaj landoj. Mi preskaŭ ne kredas, ke tiuj longega vicstaro kaj ĉiama timo, ke eble oni ne ricevos la vizon, pasis.

De buŝo al buŝo

S-ino Adri Pásztor, Hungario

Ni estis junaj geedzoj kaj multe ekskursis. Kiam ni vizitis la fortikaĵon de Boldogkőváralja ni aŭdis pri ĝia historio. Ni kaptis ideon, ke ni povus ŝate aŭskulti ian pololan rakonton pri ĝi. Ni volis vidi kiel rakontantino parolas, ĉu ŝi absorbiĝas mem en la rakonton?

En vilaĝo Boldogkőváralja konsultita virino sendis nin al malalta dometo dirante, ke la maljuna onjo vivante tie tre ŝatas rakonti. Ni facile trovis la domon. Malferminte la pordegon ni vokis la dommastrinon, sed neniu akceptis nin. Ni eniris en la korton. Nur poste ni aŭdis la maljunulinon vokadi siajn gekokojn en la malantaŭa parto de la korto. Ŝi ĵetadis grejnojn al la gekokoj kaj ankaŭ kelkaj paseroj tien flugis rapide. Ŝi estis vestita en malhela vestaĵo, kaptuko kovris ŝian blankan hararon. Kiam ŝi turniĝis, ekvidis nin starantaj ĉe la barilo. Ni salutis kaj klarigis, kial ni vizitas ŝin. La maljuna onjo senvorte atentis nin, poste eniris la domon. Post nelonga tempo ŝi revenis kun pura malhelblua antaŭtuko, portante du seĝojn. La onjo proponis ilin por sidiĝi. Ni dankis kaj sidiĝis. Ŝi sidiĝis sur la benketon, perdorse apogante sin al la muro de la dometo, ĝuste vid' al vide al ni. Ŝi demandis, ĉu ni vere de ŝi ŝatus aŭskulti ian malnovan historion? Ni jesis. „Nu, estas unu,“ certigis la onjo, „sed tiu ne estas fabelo, sed vera historio. Vi estos la unuaj, kiuj aŭskultos ĉi tiun historion, ĉar ĝis nun mi rakontis ĝin al neniu.“ Ŝi diris, ke ĝin aŭdis de sia patrino kaj tiu de ŝia avino, ĉar la rakonto en la familio flugis de buŝo al buŝo. Ĉu ni ne bedaŭras, se tio estos malgaja? Ni diris, ke ankaŭ tiam ni volonte aŭskultos. Ŝi ekparolis, sed baldaŭ ŝi signalis, ke la magnetofono ĝenas ŝin, do ni deŝaltis ĝin, kaj nun ŝi jam senĝene komencis rakonti la historion:

La evento okazis, kiam la posedantoj de fortikaĵo de Boldogkő (Ĝoja Ŝtono) estis veraj reĝoj de la regiono. La fortikaĵhavanto nomis sian filineton

reĝidino kaj tre amis ŝin, ĉar ŝi memorigis lin al lia mortinta edzino. La fraŭlino havis okulojn bluajn, kiel la somera ĉielo. Ŝia hararo estis kiel la stipoj kreskantaj sur la apudaj fortikaĵaltajetoj. Amegis ŝin ankaŭ la servutinfano kun ŝi ludanta. La fraŭlino kun plezuro aŭskultadis la ŝalmadon de la servutfraŭlo. Dum la kanto de la fajfalo la ĉielo aspektis pli blua, la verdaro de la kampoj pli densa, kaj pli orecaj estis la spikoj sur matura grenkampo. Se la reĝidino promenis, la servutfraŭlo akompanis ŝin, kaj lia fajfado ĉiam allogadis la birdetojn el siaj nestoj. Li bukedon faris por ŝi el freŝaj heleburoj, pulsatiloj kaj violoj. Kaj por ke ŝiaj ŝuetoj ne malpuriĝu, li sian ĉemizon metis sur la teron antaŭ ŝi. La servutfraŭlo donus sian vivon por la fraŭlino, ĉar tre amis la karan rideton kaj la pure sonorantan laŭtan ridon de la blonda reĝidino. Kiam la severa patro ne vidis, ili kune karesadis la katidojn, interbabiladis. Ili estis bonaj geamikoj. La tempo pasis, kaj la fraŭlino iĝis deksesjara. Iun tagon la patro deklaris, ke li por sia filino trovis edzon kaj post kelkaj tagoj okazos la gefianĉiĝo, poste la geedziĝo. La fraŭlino ŝatintus ekkoni la fianĉon antaŭ la gefianĉiĝo, sed tion la patro ne permesis. Tamen post kelkaj tagoj el malproksimo ŝi sukcesis ekkoni la estontan fianĉon. Ŝi tre malgajiĝis, ĉar tiu estis maljuna. Ŝi songis pri juna, fortbraka edzo kaj pri amoro deĉiam. Ŝi decidis ne edziniĝi al tiu maljunulo. Ŝi persvadis sian amikon, helpi ŝin fuĝi – kaj ankaŭ, ke li forkuru kun ŝi. La gardistoj nur malfrue malkovris la fuĝon. La patro unue lasis ilin, sed poste ordonis ilian reporton. La gejunuloj kuris en senvojaj regionoj. Ili nokte iris, tage kaŝe ripozis. Sed el la fortikaĵo oni vidis kie fuĝantoj estas, ĉar de tie estis videbla ĉio al malproksimo. La dornoj de la herbaĉoj ŝiris ilian vestaĵon, la ŝtonoj de la rivereto sangigis, vundigis iliajn piedojn, la branĉoj de la arbedoj skrapis iliajn brakojn kaj kruojn. Ili manĝis nur sovaĝe kreskantajn fruktojn, ĉar paneton jam delonge ili formanĝis. En valo de la rivereto Szerencs (Serenc) en malgranda arbaro, kie ili volis ripozi, la soldatoj de la severa patro kaptis ilin. La fraŭlinon tuj levis la estro de soldata taĉmento en selon. La manojn de la servutfraŭlo la soldatoj ligis al la sel-arko, kaj tiel ili trenis lin hejmen. Tie lin atendis malhela arestejo en malvarma kelo. La fraŭlinon oni vestigis fianĉino. Baldaŭ okazis la gefianĉiĝo, poste la geedziĝo. Post la ceremonio kaj geedziĝa bankedo, drinkfesto, la geedza paro preparis sin foriri al malproksima hejmo de la edzo. Sed ili eĉ la pordegon ne atingis, kiam okazis trista ĝeno. Oni alportis kadavron de la servutfraŭlo. Lin liberigis de liaj korpaj kaj animaj suferoj malgranda serpento. Ĝi ekordis lin, kiam oni lin enpuŝis en la karceron, kaj li falis sur ĝin.

Post la rakonto la maljunulino longe silentis, kun larmohavaj okuloj. Poste ŝi viŝis la larmojn kaj adiaŭante petis nin, ke ŝian historion ni bone uzu, bone prizorgu.

Miksitaj pensoj

Kerstin Rohdin, Svedujo.

Malfrusomeraj spuroj en la naturo miksiĝas kun freŝaj aŭtunaj. La fino kaj la komenco sin intersalutas. La sunbrilo malfortiĝas kaj malfrue vekigigas matene. Mi promenas en la arbaro kaj atingas arbaran lagon Ramsjöm, sidiĝas sur benkon ĉe la rando de la lago. Du virinoj interparolas malantaŭ mi, sed tiel mallaŭte, ke mi ne aŭdas la vortojn. Krom ilia murmurado regas tuta silento, kiel oni en la nuna mondo nur aŭdas malproksime for de urboj kaj homoj. La vento dormas. La sunradioj ludas sur la preskaŭ senmova akvosurfaco. Apud mi ĉe la akvorando kuŝas iom da sablo. Ĉikaŭ la aliaj flankoj de la lago kreskas betuloj, alnoj, tremoloj inter rokoj kiuj ĉirkaŭbrakas la lagon. En la akvo staras altaj kanoj, kiuj jam iom flaviĝas. Je la kontraŭa flanko de la lago la betulaj trunkoj aperas kiel blankaj strioj. De tie aŭdeblas batado de granda pego. Krom tiuj sonoj estas profunda silento. La virinoj foriris. Malantaŭ mi kreskas filikoj, kiujn oni en kelkaj landoj kolektas junie, plektas kronon kaj naĝigas ilin sur marsurfaco aŭ rivero por amanto. Nun la restantaj, nekolektitaj flaviĝas por baldaŭ bruniĝi kaj morti.

Kelkfoje la sunradioj ludas sur la akvosurfaco, kelkfoje la ombroj prenas iliajn lokojn. Ludo inter helo kaj malhelo kiel en vivo. La pensoj vagas, miksiĝas. La ĉielo bluas. La nuboj kolorŝanĝiĝas. La naturo gvidas pensojn. Sidante sur la benko pensoj povas migri sur pado al Santiago de Compostella en silenta soleco. Aŭ ili povas vagi supren inter montaro inter ardantaj koloroj surgrunde. Aŭ vintre skiante sub neĝopezaj branĉoj en vastaj arbaroj. Aŭ en boatoj sur sunbrilaj ondomovanta marsurfaco. La tuto estas nia mondo. La tuto estas via vivo. Via vivo ankaŭ entenas viajn pensojn pri viaj ideoj kial kaj kiel vi troviĝas sur la globo. Laŭ la „Skribitaj tekstoj“ estis HOMO iam elĵetita el Paradizo. Ĉu la signifo de la vivo estas trovi, rekrei ĝin por si? Kio estas la Paradizo? Ĉu la eta punkto apud lago? Ĉu silenta momento? Ĉu ludo de sunradio inter la branĉoj en arbaro? Ĉu ondoj en maro? Ĉu rideto de homoj? Ĉu amika vorto inter homoj? Ĉu apogo, kiam vi preskaŭ falas? Ĉu muziko, kiu trovas vojon al via koro? Ĉu pripensindaj vortoj, kiuj vi trovas en poemo aŭ romano? Ĉu krei per la manoj iun belaĵon? Ĉu doni vian manon al alia homo? Ĉu faraĵoj, kiuj ĝojigas alian homon? Ĉu tio estas la vojo tra la vivo? Ĉu tio estas signifo de la vivo? Ĉu tio estas kolekti saĝecon por porti, ĝis kiam vi alproksimiĝas al la fino de sia vojo? Ĉu tio estas trovi la Paradizon?

Sidante sur la benko apud arbara lago la pensoj fluas, la ideoj pri la vivo migras. Per kio estas gvidata la vivo? Ĉu estas nur demandoj? Ĉu ekzistas respondoj? Ĉu eblas diskuti nur kun si mem, nur kun ondoj, nur kun la nuboj, kun la pluvo? Ĉu verkistoj donas al vi respondojn? Ĉu la komponistoj, ĉu artistoj? Serĉu ĉie! Inter naturo, inter homoj, en viaj propraj pensoj, ĉe la dio en via koro! Ĉio tiu abundaĵo, kio ekzistas en la mondo, tio estas la signifo de la vivo, tio estas la Paradizo. Donu ĝojon kaj vi ricevos ĝojon. Ĉu tio estas la vivo?

Jes, tio verŝajne estas la vivo.

Mi reiras tra pinarbaro kun sunradioj ludantaj inter branĉoj kaj trunkoj al kvartalo kun bele aranĝitaj ĝardenoj, daŭrigante al altaj domoj sepetaĝaj. En unu el ili troviĝas duĉambra apartamento sur la kvina etaĝo kun vasta superrigardo super arbaro kaj ĉielo. Ĝi atendas min.

El la vidpunkto de Helena Maudrová

Mia bona amiko malfermis tirkeston de komodo de sia edzino kaj elprenis paketon en silka papero. Ĝi ne estis nur kutima pakajeto. Interne estis bela virina tolaĵo. La amiko la paketon malligis kaj ekrigardis silkojn kaj delikatajn punktojn.

„Ĉi tion mi aĉetis al ŝi, kiam ni estis unuan fojon en Nov-Jorko. Tio povus esti eble antaŭ 8-9 jaroj. Neniam ŝi surmetis ĝin. Ŝi volis tion vesti nur ĉe eksterordinara okazo. Kaj nun, mi opinias, ke estas tiu ĝusta momento.“

Li proksimiĝis al lito kaj metis tiun silkan tolaĵon al aliaj objektoj, kiuj estis preparitaj por funebra servo. Lia edzino nome mortis...

Poste li turnis sin al mi kaj diris: „Prokrastu neniam ion por speciala momento. Ĉiu tago, kiun vi vivas, estas la ekstraordinara momento.“

Kaj mi ĝis nun pensas pri liaj vortoj, kiuj ŝanĝis mian vivon.

Nune mi legas pli multe kaj ordigas loĝejon malpli multe. Mi sidadas ofte sur balkono, trovas plezuron en naturo, kaj malatentas herbaĉon, kiu kreskas inter miaj floroj. Mi pasas pli da tempo kun mia familio kaj miaj amikoj. Mi plu nenion kaŝas por pli poste. Ĉiutage mi utiligas miajn kristalajn pokaletojn. Kiam mi volas, mi vestas min per nova leda jakto, eĉ se mi iras nur trans la strato en memservan vendejon. Kaj ankaŭ la plej multkoston parfumon mi aplikas, kiam mi volas. La vortoj ekzemple „iam“ aŭ „ĉeokaze“ jam en mia vortaro ne ekzistas. Nun mi preterlasas, prokrastas nenion, kion mi havas por ĝojo kaj kio alportas la ridon en mian vivon.

Senĉese mi diras al mi: „Ĉiu tago kaj ĉiu minuto estas ekstraordinara kaj valoras por tio vivi.“



Paradizo aŭ Infero: kia estas diferenco?

Jen mia traduko al Esperanto de la interesa artikolo publikita en la franca de c'claudes por dividi la plezuron kun nia esperanta komunumo.

Nguyen Xuan Thu sabato 13a de Decembro 2008 je 09:10

Foje sanktulo havis konversacion kun Dio. Li diris: „Dia Moŝto, mi deziras scii, kia estas la ĉielo kaj kia estas la infero?”

La Dio gvidis la sanktan viron al du pordoj. Li malfermis unu pordon kaj permesis al la sanktulo rigardi enen. Meze de la ĉambro estis grandega ronda tablo. En la mezo de ĉi tiu tablo videblas granda kruĉo enhavanta raguon kun bongusta aromo. La sanktulo salivumis pro granda deziro manĝi. La homoj sidantaj ĉirkaŭ la tablo estis maldikaj, palegaj kaj malgajaj. Ĉiuj aspektis malsataj, tenante kulerojn kun tre longaj teniloj alligitaj al iliaj brakoj. Ĉiuj havis la eblecon atingi la raguon kaj ĉerpi plenkuleron da manĝaĵo. Sed pro tio, ke la kulertenilo estis pli longa ol iliaj brakoj, ili ne povis revenigi la kulerojn en siajn buŝojn. La sanktulo tremetis ekvidinte ilian mizeron kaj ilian suferon.

La Dio diris: „Vi ĵus vidis la inferon.”

Dio kaj la sanktulo iris al la dua pordo. La Dio malfermis ĝin. La sceno, kiun vidis la sanktulo, estis identa al la antaŭa: Estis granda ronda tablo kun la kruĉo da bongusta raguo, kiu same salivumigis la sanktulon. La homoj ĉirkaŭantaj la tablon estis ankaŭ ekipitaj per kuleroj kun longaj teniloj. Ĉifoje, tamen, la homoj estis bone nutritaj, sataj, ridetante alparolantaj unu al la alia. La sanktulo diris al Dio: „Mi ne komprenas!”

„Estas simple,” diris Dio, „necesas ununura lerteco: Ili lernis nutri unu la alian, dum manĝemuloj kaj egoistoj pensas nur al si mem!”

Estas taksite, ke 93% da homoj ne dividos tiun rakonton inter si...



Portreto

Olga Glendová, Ĉeĥio.

Historieto de nekonata aŭtoro rakontas, ke unu riĉa, bonstata viro havis filon. Ili ambaŭ reciproke bone interkompreniĝis. Eĉ ili havis la saman ŝatokupon - pentro-arton. Ili komune kolektis la bildojn kaj en ilia kolekto estis tre valoraj kaj famaj verkoj de tutmondaj pentristoj.

Komenciĝis milito. Do la filo devis eksoldatiĝi. Li estis tre kuraĝa viro. En unu batalo li klopodis savi sian grave vunditan amikon, kaj kiam ili estis preskaŭ en sekura loko, la kuglo morte trafis lin. Tiu trista sciigo tre konsternigis lian patron.

Post la milito aperis ĉe la patra pordo nekonata viro, alportanta la pakaĵon al li kun vortoj: „Vi ne konas min, sinjoro, sed mi estas tiu soldato, al kiu via filo savis la vivon. Mi tre bedaŭras, ke li mortis. Ni estis tre bonaj amikoj kaj via filo ofte rakontis al mi pri via amo al la pentro-arto.”

Kun menciitaj vortoj transdonis tiu juna viro al la patro pakaĵon kaj plue li diris: „Mia verko ne havas grandan valoron, sed mi pensas, ke via filo estus ĝojigita, se vi akceptus de mi tiun donacon.” La patro malpakis la pakaĵon vidante portreton de sia filo! La patro estis mirigita pro simileco de la bildo kun vera vizaĝo de lia amata filo. Li estis profunde kortuŝita. Li dankis kaj proponis al la viro, ke li volonte aĉetus de li la bildon. Sed la donacanto tute malakceptis tiun proponon. „Mi estas la ŝuldanto, ne vi! Neniam mi povus reciproki al vi tion, kion faris por mi via filo. Tial bonvolu akcepti tiun donacon, kiel esprimon de mia danko kaj rememoro.” La patro dankeme akceptis la donacon. La bildo havis ĉiam honoran lokon en lia kolekto.

Post kelkaj jaroj ekde tiu ĉi okazaĵo la patro mortis. Laŭ testamento la tuta kolekto estis difinita por granda aŭkcio. Alvenis multe da signifaj kolektantoj de arto kaj senpacience ĝojatendis prezentadon de la valora kolekto kun arto de mondfamaj pentristoj. Havante unikan oportunon aĉeti la verkojn de famaj majstroj, ili malpacience atendis. Finfine la aŭkcio komenciĝis kaj antaŭ okuloj de vizitantoj la plej frue aperis la Portreto de la Filo.

„Kiu komencos pere de unua propono?” demandis aŭkciestro.

„Ni volas vidi verkojn de la majstroj”, protestis vizitantoj. Sed la aŭkciestro persistis je tio, ke la portreto estu aŭkciita komence.

Iu denove malkonsentis: „La portreton donu je la fino, la plej frue ni volas vidi Van Gogh, Rembrandt kaj aliajn majstrojn!”

Sed la aŭkciestro daŭrigis: „Mi ofertas Portreton de la Filo, kiu komencos, kiu volas aĉeti la bildon?”

Estiĝis profunda silento ... Finfine ie malantaŭe aŭdiĝis la voĉo. Ĝi apartenis al familia ĝardenisto, kiu bone konis filon de sia infaneco, tiu ĉi homo ankaŭ vizitis aŭkcion. Nun li diris pere de sia modesta mallaŭta voĉo: „Mi proponas dek dolarojn por la portreto.”

La ĝardenisto ne apartenis inter riĉuloj kaj dek dolaroj estis ĉio, kion li havis tiutempe ĝuste en sia monujo.

„Ni havas unuan proponon, dek dolarojn, kiu donos pli multe?”

La plua propono ne alvenis, do la bildo estis vendita nur je la 10 dolaroj!

La protestanta viro ekkriis: „Nun finfine komencu kun vera aŭkcio!”

Sed aŭkciestro respondis: „Mi bedaŭras, sinjoroj, sed la aŭkcio finiĝis”.

„Kaj kio okazos kun verkoj de la majstroj?”

„Mi bedaŭras, sed mi devas respekti la testamenton. Kiam oni plenrajtigis min, ke mi aŭkcios la kolekton, mi ne estis rajtigita tuj malkaŝi la testamenton. Sed nun mi anoncas al ĉiuj, ke la aĉetanto de la portreto gajnas ne nur la tutan valoran kolekton de la pentrista arto, sed fariĝas ankaŭ heredanto de la tuta postlasaĵo. Tiu, kiu aĉetis la portreton de la filo de posedanto, gajnas ĉion!”

Albert Einstein

Ĉu vi deziras havi inteligentajn infanojn?

Legu al ili fabelojn.

Ĉu vi deziras havi ilin pli inteligentaj?

Legu al ili pli da fabeloj.

Johano Komenio (1592-1670)

Ne kredu ĉion, kion oni diras al vi por kredo. Esploru ĉion kaj konvinku vin pri ĉio mem.

Penu agi por la bono, dum vi disponas tempon.

Estas danĝere havi la kapon ĉiam plena de revoj,
sed la manojn senokupaj.

Editora Lorenz.

Aforismoj

Patricie Holečková

Kiom da saĝaj ideoj restis senatentitaj nur pro tio, ke ili estis eldiritaj de stultuloj.

Ni pensas, ke ni scias, dume ni devus scii, ke ni nur opinias.

La amo de unuarigardo estas ofte nur amo de unu rigardo.

Kiu paftrafas aliulojn, ofte mem falas.

Mi timigas min pli antaŭ senspiriteco ol antaŭ spirituloj.

Granda eraro estas pretervidi la malgrandan eraron.

Ni ne iluziu, ke ni ne havas erarojn.

Tragedio de la geedzeco bazas en tio, ke ĝi estas kunigata pro racio aŭ pro malracio.

Dum mizero vi ekkonos vin mem.

Ne havas sencon incitiĝi pro tio, kion ni ne povas ŝanĝi, nek havas sencon incitiĝi pro tio, kion ni povas ŝanĝi.

Dum al la bono ni devas helpi, al la malbono sufiĉas okazo.

Malsaĝulo faras stultaĵojn senpripense, dum raciulo nur post matura konsidero.

Saĝulo estas tiu, kiu kapablas malparoli, kiam parolas aliaj kaj paroli, kiam aliaj silentas.

Feliĉo signifas ĉiam ion alian.

Esperantigis MUDr Josef Hradil, 12. 4. 2008 |

Pli da aforismoj vidu : <http://www.aforismy.unet.cz/>

www.martinvrsecky.wgz.cz

Po-signon, simbolon de interreta epoko oni jam uzas duonon da miljaro

Estas tre interese, kiel la plimulto da lingvoj en la mondo pritraktas la signon @. Ekzemple en la ĉeĥa oni nomas ĝin „*zavináč*“, kiu signifas tranĉaĵon el fiŝa viando volvita, farĉita per legomo en acida saŭco. Do simileco estas klara.

Eĉ aliaj lingvoj prenis nutraĵmaterialon, aŭ elektis el besta mondo por krei neologismojn. Finnoj kreis eĉ du vortojn: „*kissanhätä*“ – kata vosteto kaj „*miukumaku*“ – interjekcion por miaŭki. La najbaraj danoj elektis por la po-signo voston de porketo – „*grisehale*“ kaj nederlandanoj voston de simieto – „*apenstaartje*“. Rusoj enmetas tutan hundeton – „собачик“.

La sudslava slovena uzas „*afina*“ - simio, serba „*Majmunče*“ – simiido. Greka „*papáki*“ signifas anasidon kaj hungara „*kukac*“ – vermon.

Konatan deserton en Germanio kaj Ĉeĥio – „*štrúdl*“ – elektis en Izraelo – „*krukhit* aŭ *strudel*“. En Katalunio elektis desertan specialaĵon el insulo Mallorca – „*arrova*“.

Hispana kaj portugala „*arroba*“ kaj simile franca „*arobase*“ devenas el pesilo unuo, kiu estis uzata en Pirenea duoninsulo.

Malmulte da fantazio eble havis angloj – simple „*at*“. La same faris germanoj kaj japanoj („*attomaku*“ – signo at). Ĉi tie @ estas proksime al latina „*ad*“.

Laŭ profesoro de historio en roma universitato La Sapienza, la signon kreis antaŭ 500 jaroj Florencaj negocistoj. Temis pri mallongigo de la vorto „*amphora*“, kiu krom tipa vazo signifis volumenan mezurunuon - ĉirkaŭ 5,5 litroj.

Sur franca kortumo en 17-a jarcento oni uzadis @ kiel propozicio de dativo, por indiki adresaton sur letero.

Sur klavaro de unuaj skribmaŝinoj aperis signo @ ĉirkaŭ la jaro 1880 kiel „tiel nomata negoca signo at“ en senco de universala prezo por varoj. En nia ĉeĥa lingvo ni ĝin transprenis en la sama senco kiel „à“.

Por nuntempa uzado de la „po-signo“ unuan fojon ĝin uzis tridekjara Ray Tomlinson en la jaro 1972 por divido de majla adreso. Tiu usona inĝeniero kreis ion, kion li nomis „rapida hako“ (*Quick hack*). Historie li unuan fojon sendis interretan mesaĝon al si mem al alia komputilo. Ray Tomlinson serĉis sur klavaro signon, kiun ne povas enhavi iun ajn vorto por eviti ĥaoson en elektronikaj tekstoj.

Tagĵurnalo PRÁVO septembro 2009-09-05
(SW)

En Esperanto aperis kaj enhejmiĝis „@“ kiel „heliko“.

Elĉeĥiĝis J.Drahotová

Indianaj ĉifroj

marie.homolova@seznam.cz

Je la 20-a de julio 2010 pasis kvin jarojn de la morto de la viro Charles Chibitty. Kio li estis? Li estis la lasta ano de la teamo de usonaj armeaj radikomunikistoj, kiuj anstataŭ ĉifroj uzadis lingvon de la indiana tribo „Komanĉo“. Vortoj, kiujn germanoj dum milito radikaptis, certe sonis al ili kiel el planedo Marso, verŝajne ili ne eksciis, ke ne temas pri ĉifroj, sed pri la lingvo de indiana tribo.

„Mi imagis pri kia infero Hitler pensas, kiam li aŭdis niajn voĉojn,“ rememoris Charles Chibitty komence de la 90-aj jaroj, kiam li estis premiita per alta usona ordeno.

La rolo de li kaj liaj amikoj nomitaj „Code Talkers“ komencis iel paradokse: „En lernejo oni malpermesis al mi paroli mian gepatran lingvon. Poste min mia gepatra lando petis, ke mi mian lingvon revivigu. Mia lingvo helpis la militon venki kaj mi pri tio fieras.“

Charles Chibitty, la lasta „Code Talkers“, naskiĝis en indiana tendo en montara vilaĝeto en ŝtato Oklahoma. En la jaro 1940 li studis altlernejon kaj aŭdis, ke usona armeo preparas krei teamon de specialistoj – radikomunikistoj, parolantaj gepatran lingvon malmulte praktikatan. Li vizitis sian vilaĝon, petis sian patrinon pri permeso kaj aliĝis en armeon.

El kvardek „komanĉanoj“ oni elektis 17, kiuj estis edukitaj radikomunikistoj. Por samtempaj teknikaj vortoj ili devis elpensi vicon da nocioj. Charles mem estas aŭtoro de kelkaj vortoj. Pri tio li sprite rakontis: „Mitralon mi nomigis kudromaŝino, ĉar ĝia bruon memorigis al mi bruon de la kudromaŝino de mia patrino. En mia infaneco min gvidis mia patro por fiŝkapti. Kiam ni kaptis siluron kaj ni ĝin senviscerigis, mi vidis ĝin plenan de fiŝovoj, do bombardaviadilo ricevis nomon „graveda aviadilo“.

Charles Chibitty partoprenis albordigon sur plaĝojn en Normandio kaj bone memoras la unuan mesaĝon kiun li sendis: „Kvin mejloj dekstre de destinita loko kaj kvin mejloj en landon furiozas batalo kaj ni bezonas helpon.“

La kvara infanteria divizio, kie Charles soldatiĝis, pasis en la plej malfacilaj bataloj en Eŭropo, inkluzive de la batalo en Ardeny kaj kiel la unua envenis Parizon... Iaj „Code Talkers“ estis vunditaj, sed travivis la militon ĉiuj.

Post la milito Charles laboris kiel vitristo kaj inter indianoj li estis fama kiel mirinda dancisto de specialaj tribaj militaj dancoj ĝis alta aĝo. Liajn dancojn oni komparis al papilia flugo.

„Navajoj“

„Komanĉoj“ ne estis ununuraj indianoj, kiuj historie rolis. Jam dum unua mondmilito usona armeo utiligis indianojn el triboj „Cherokee kaj Choctaw“. Konata estas okazaĵo, kiam en Meuse-Argonne francaj trupoj kun helptrupoj de usonaj soldatoj restis ĉirkaŭiĝitaj kaj bezonis interkonsenti pri plua agado. Ili sciis, ke germanoj kapablas deĉifri iliajn raportojn. En tiu momento la

komandanto ekaŭdis babili du indianajn soldatojn kaj kaptis ideon. La provo sukcesis danke al hazardo, ĉar en ĉefordonado troviĝis „Choctawano“, kiu konis tiun malnovan lingvon...

Sed la plej faman ĉapitron de „Code Talkers“ skribis dum la dua mondmilito „Navajoj“, kiuj kiel radikomunikistoj laboris en pacifikaj regionoj nome en la plej sanga batalo ĉe Guadalcanal. La iniciatoro de la utiligado de indianoj estis Philip Johnston. Lia patro estis longjare misia pastro en indiana defensejo kaj Johnston kiel infano plene eklernis la indianan lingvon.

Dum komunikado rolis grava fakto, ke navajan lingvon jam konis nur kelkaj homoj. Krom tio la elparolo de vortoj estas tre malfacila. Avantaĝo estis la rapido, kiel oni povis tradukadi raportojn al la angla lingvo. Dum testoj oni sukcesadis interpreti trilingvan raporton en dudek sekundoj kaj la maŝina tradukado daŭris duono da horo. Utiligado de „navajanoj“ apartenis al la plej sekretaj servoj. La „kodoj“ japanoj neniam deĉifris. Poste usonanoj utiligis indianojn en militoj en Koreio kaj Vjetnamio.

Elĉeĥiĝis Jindřiška Drahotová.

„Avino, mi nun tre facile vojaĝos, ĉar mi somere konatiĝis kun Esperanto.“

„Bone, nepino, sed atentu, ke li ne tro rapide ŝoforos sian aŭton!“

Esperanta kato

Jaroslav Krolupper

En pensiono ESPERO en Skokovy, ĉarma vilaĝo proksime de „Bohemia paradizo“, belega regiono de Ĉeĥa respubliko, oni jam multajn jarojn aranĝas esperantajn kursojn. Ankaŭ mi en tiuj kursoj kelkfoje partoprenis. Mia lasta vizito restos enskribita en mia memoro por ĉiam. Mi travivis tie ĉe unu posttagmeza promeno okazaĵon, kiu estas tre grava por studo de disvastigado de Esperanto. Ĉar tie manifestiĝis **scipovo de Esperanto mem disvatigadi !**

Kio okazis: Promenante, mi ekvidis sur herbejo subitan rapidan movon de nigra-blanka korpo. Ĝi aperis kaj ree malaperis. Mi rigardis la lokon pli atente kaj vidis katon, kaptantan muson. Mi amike demandis ĝin (kompreneble en la ĉeĥa): „*Tak co, chytilas?*“ La kato ignoris min. Mi ripetis la demandon kaj la

kato denove min ignoris. Jen venis en mian cerbon ideo alparoli la katon esperante. Mi vokis al ĝi: „Ĉu vi kaptis?“ Kaj la kato iomete leviĝis, turnis la kapon al mi kaj per piedo antaŭ la buŝo mansignis: „Silentu!“ Poste ĝi ree tuŝkuŝiĝis sur teron kaj kaŭriĝis, atendente muson.

Mi ne sukcesis malkovri, kiamaniere efektiviĝis ĉi tiu miraklo. Certe gravas la longtempa regula ripetado de esperantaj kursoj. Helpas eble ankaŭ la natura beleco de la regiono. Mi nepre ĉe mia venonta vizito en Skokovy alparolos esperante iun el ĉevaloj, kiuj tie paŝtadas. Mi certe sukcesos. Bestoj estas ofte pli saĝaj ol homoj.

Urĝa helpo

Pavel Tomeš, Sedmička mf, numero 19, jaro 1, aŭgusto 2009

Kion mi vere ne volus fari, estas efektiviĝi urĝan helpon al iu. Unu el la kialoj estas mia bofrato. Li estas kirurgo kaj asertas, ke oni veturigas en hospitalojn tro multe da homoj, spite ke povus solvi katastrofojn sur la loko trankvile eĉ neprofesiuloj. Dum liaj vizitoj ĉe ni li instruas al mi lecionojn pri urĝa helpo por progresantoj.

Laste li ekzemple tre detale lecionis al mi pri „koniotomio“ - simpla tranĉo de gorĝo al hazarda preterpasanto, al kiu subite edemiĝas lango kaj ŝtopas spirtubon. Ankoraŭ hodiaŭ mia adampomo ne revenis al ĝusta loko, ĉar la bofrato montris al mi akurate kiel mi devas per akra tranĉileto tranĉi kaj „ion enŝovi“ en traĥeon, por ke la malfeliĉulo povu spiri.

La bofrato instruas al mi iom post iom kiel solvi diversajn gravajn akcidentojn kaj akutmalsanojn sen zorgo pri miaj traŭmoj. Dum lasta vizito abrupte demandis: „Kion vi faros, se venos al vi viro kun „pneŭmotorako“? Mi iom pensis: „Ĉu mi donu al li ian ŝmiraĵon kaj Aspirinon?“ mi provis.

„La homo, kun brusto kiel balono, ne havas humoron por ŝercado!“ ekkoleris la bofrato. „Post akcidento al la homo amasiĝas en brusto aero, presigas koron. Vi devas helpi! Do, kion vi faros?“

Mi ne sciis. Mi volis levigi ŝultrojn, sed post pasinta leciono „kiel reveni luksacitan ŝultron reen“, mi ne sukcesis.

„Vi drenos pleŭran kavon!“ diris la bofrato.

„Kion mi faros?“

„Nu vi prenos ŝraŭbilon kaj enigis ĝin sub tria ripo kaj simple elblovos la homon, klare?“

„Ne, tion mi ne faros!“

La bofrato akre rigardis min sekundon kaj poste diris: „Ne? Bone pripensu, ĉar okaze de nefaro de urĝa helpo venas puno ĝis 3 jaroj en prizono!“

Tradukite de J. Drahotová kun autora permeso.

Co je lidské štěstí

Lidské štěstí je jak sněhová vločka
a vločka je jen krásně zmrzlá voda,
brzy se rozpustí a to je škoda,
a když se k vodě vrací,
trochu to zazebe.
Tak také s lidským štěstím je to,
vždy do prázdna se ztrácí,
vždycky to zabolí.
Nebylo pro tebe,
chtěl jsi je pro sebe.

Míla Tomášová - Setkání

Kio estas homa feliĉo?

Ĝi estas kiel neĝero,
kiu estas fakte nur bele frostita akvo,
baldaŭ ĝi degelas
kaj kiam revenas al likvaĵo –
malvarmiĝas.
Same okazas al homa feliĉo,
ĉiam ĝi malaperas,
ĉiam dolorigas.
Ĝi ne estis por vi,
vi nur volis havi ĝin por si.

Míla Tomášová - Renkontiĝoj

Anekdoto el interreto

Imre Szabo

Egiptanoj trovas mumion. Ili tre ĝojas. Tamen ili deziras havi pli da informoj pri ĝi, do ili sendas ĝin por esploroj al Anglio. Post du semajnoj revenas la mumio kun skrapeto sur la kapo. Apude la priskribo: "Mezaĝa viro vivinta a. K. inter la jaroj 3000 kaj 2000, lia sanstato ne estis bona."

Tio ne sufiĉis al Egiptanoj, ili sendis ĝin ankaŭ al Usono. Post du semajnoj revenas la mumio kun du novaj skrapetoj sur la kapo, apude la mesaĝo: "Viro en la fino de siaj 20-aj vivojaroj, li vivis a. K. inter la jaroj 2600 kaj 2400, li lamis je la maldekstra kruro, kaj li havis korproblemojn."

Al Egiptanoj sufiĉis eĉ ne tio, ili do sendis la mumion al rusoj. Post monato revenas la mumio, distranĉita, rompita je pecoj, kaj apude la skribaĵo: "La 27-jara viro apartenanta al la socia mezklaso vivis a. K. en 2578-2551. Kiam pro korproblemoj li iris al la loka kuracisto, li stumblis, li rompis al si la kruron, kaj li lamis poste dum la tuta vivo. Li mortis pro koratako."

La Egiptanoj konsternite legis la priskribon, kaj ili demandis la rusojn, per kiaj ampleksaj esploroj ili sukcesis malkovri ĉion ĉi?

La respondo: „Li konfesis ĉion.“

Avino trikas

Avino trankvile trikas.
Pikas, pikas, uzas lanon.
Unu grizan, unu blankan.
Rapide ŝtrumpeto kreskas.

La kateto volas ludi,
stultaĵon imagas ĝi.
Lerte saltas sur lanpilko,
kaj ĝin rulas sur la planko.

Movas, movas ĝiaj kruroj,
ili faras laboregon!
La globeto disvolviĝas...
Avino nenion vidas!

Kiam ŝi turnas la trikaĵon,
jen, subite, lano bremsas!
En la ĉambro avino rigardas,
De la kato vidas la fuŝludon!

Atentu! Fripono! Bestaĉo!
Kateto, katetaĉo!

La ĉielarko

Pluvas, sunas...pluvas, sunas.
Bela ĉielarko en ĉielo brilas.
Sur vojo, kun avino, la nepo marŝas.
„Fripono! En flakojn, mi petas, ne saltu!“

„Mi ne plu faros, avino! Pardonu!”

Nun suno brilas, promenado daŭras.
Printempe la vetero ofte varias.
Subite, mirinde, la knabo haltas.
„Avino! Kion sur la vojo mi vidas?
Ĉi tie! La ĉielarko teron frakasas!“

„Bebo! Kian stultaĵon vi diras?“
„Ne stulto! Vere! Tion rigardu!
La koloroj sternaĝas sur vojo! Vidu!“
“Ve! Kara nepo! Estas nur benzino
perdita de malpura aŭtomobilo!”

Heléne Caous, Pluezeka grupo,
<http://www.babelo.org>



Ĉe la lago proksime de Kaposvar

Béla Kovacs, Hungario, 2009.

Proksime al la urbo Kaposvár estas artefarita lago. Antaŭ jardekoj ĝi estiĝis kaj ekde tio ĝi estas ŝatata ekskursejo kaj fiŝkaptistejo de la kapoŝvaranoj. En la someraj monatoj multaj homoj vizitas ĝian plaĝon por bani kaj sunumi. La belega pejzaĝo kun montetoj kovritaj de pitoreskaj arbaroj ravas la turistojn kaj ripozantojn.

Antaŭ nelonge perbicikle mi ekskursis tien farante kelke da fotoj. Promenante sur la lagobordo miajn okulojn ekpikis savboaton. Nu, ĝi ne estus strangaĵo sur lago, ja ĉie sur ĉiu lago en la mondo oni povas vidi similan akvoveturilon. Kie oni baniĝas, naĝas kaj boatumas, tie laŭleĝe estas necesa starigi tian bazon por savi la vivon, se hazarde okazas akcidento.

Sed tio jam estis stranga por mi, sur la savboato estis skribite nur angle: LIFEBOAT.

Por kiu? Tiun ĉi lagon grandparte vizitadas nur hungaroj. Eksterlandanon malmultas eĉ en la plej varmaj monatoj. Se tamen oni renkontiĝas kun ili, tiam ili venas kun siaj hungaraj geamikoj.

Mi timas pri la hungara lingvo. Eble hodiaŭ nur sur tiu ĉi boato estis angla teksto, sed alvenos tago, kiam la hungaraj vortoj malaperas de sur niaj stratoj, kaj ĉie oni trovos nur fremdajn vortojn. Malrapide la okuloj kaj oreloj al kutimiĝos ilin. Fine ni mem estos la ekzekutistoj de la hungara lingvo.

Ni ne atendu tiun ĉi tagon! Ne hontu uzi nian belegan lingvon, ĉar eble ankaŭ la eksterlandanoj prefere renkontas hungaran lingvon, ol ian uniformitan anglan lingvaĉon.

(Per la angla lingvaĉo mi ne deziras insulti la angle parolantojn, ĉefe ne la anglojn, sed dum la lastaj jardekoj mi ofte spertis, kiel kelkaj samlandanoj miaj kripligas la belegan lingvon de Ŝekspiro.)

Pentekosto

Béla Kovacs

La katolikoj festas Pentekoston. Laŭ la biblio pentekoste la diverslingvaj homoj komprenis la voĉon de la apostoloj. Inter ili regis granda lingvoĥaoso. Multaj el ili parolis malsaman linvgvon.

Kio okazis ĉi tage?

Mi nur ekprovas diveni. Mi scias ĝi estas nur fantaziaĵo. Tial mi petas pardonon de la religiemuloj, kial mi aludas per tiu ĉi grava evento.

Mi intencas insulti neniun, sed lasu min ludi per la imago!

Eble iu eltrovis komunan lingvon kaj ĝi estis vaste uzata. Tiu ĉi lingvo estis ia praesperanto. Tiam tiu ĉi evento jam ne estas miraklo, eĉ ĉiutaga fenomeno. Por multlingva homamaso oficiale estis uzata tiu ĉi helplingvo.

Kio estis tiu ruĝa flamo, super la kapo de la ĉeestantoj? La klarigo estas simpla. Tiel oni signis la uzadon de la komuna lingvo.

Kiam la Sinjoro parolis ĉiuj komprenis lin, kvankam ili estis diverslingvanoj.

Certe jam antaŭ multaj jaroj la homaro bezonis helplingvon per kio oni komprenu unuj la aliajn.

En nia epoko la multlingveco estas pli urĝa, ol tiam, do mi malpacience atendas, ke la flamo aperu super nia kapo.

Ludoj kun diablo

Iu viro mortis kaj eniris ĉielon. Ĉi tie li estis jam longtempe kaj ekenuis. Li demandis Sanktan Petron, ĉu li permesus al li por unu tago viziti inferon, ĉar la ĉiela rutino lin jam enuigas. Sankta Petro iom hezitis, sed poste tamen konsentis kun lia ekskurso inferen dum unu nokto.

„Saluton, diablo, mi alvenis al vi por unu nokto,“ diris la viro enirante, „mi aŭdis, ke ĉi tie estas agrabla distro.“

„Vi bone faras,“ diris la diablo kaj prezentis al la viro belan inon.

Matene la viro revenis kontente ĉielen. Post kelkaj semajnoj la viro denove demandis Sanktan Petron, ĉu li povas denove viziti inferon. Ĉio okazis same kiel la unuan fojon. La diablo donis al la viro alian belulinon je dispono. Post reveno ĉielen estis la viro tre kontenta. Kaj la tempo denove fluis kaj la viro decidis translokiĝi en inferon por eterne. Li alparolis pri tio Sanktan Petron. Petro persvadis la viron resti en ĉielo, sed post longa marĉando finfine konsentis.

La viro eniris inferon kaj konfesis al diablo, ke li decidis resti en infero. La diablo invitis lin, sed nun la diablo ne proponis al la viro junulinon, sed maljunan ŝrumpintan megeron.

„Kien malaperis tiuj belaj virinoj?“ konsternite demandis la viro.

„Sinjoro!!! Turismo estas turismo, sed enmigraĵo estas alia taso de teo,“ respondis la diablo.

El ĉeĥa gazeto esperantigis Jana Holcová, Ĉeĥio
januaro 2008

Nokte oni vokis kuraciston al riĉa paciento, kiu plendis pri siaj doloroj imagitaj.

„Ho, doktoro, mi certe mortos.“

La kuracisto ekzamenis lin, sed ne trovis lin malsana.

„Ĉu vi jam pretigis vian testamenton?“ demandis doktoro.

„Ne, ĉu mi jam ...“ paliĝis la paciento.

„Bonvolu tuj alvoki vian advokaton, filojn kaj bofilinojn,“ respondis la kuracisto.

„Ĉu mi mortos tuj?“

„Ne, vi estas tute sana, sed mi ne volis esti la sola stultulo, kiun oni vane vekis noktomeze kaj venigis senbezone al via domo,“ respondis la kolera kuracisto.

Intervjuo kun edzo de esperantistino

Jes. Mi ŝatas Esperanton. Mi estas tolerema homo. Sed ĉio havu siajn limojn.

De kiam mia edzino esperantiĝis, mi sentas min ofte sola. Jes. Mi ankaŭ eklernis Esperanton. Mi eĉ partoprenis la kurson. Dum la tuta semajno mi pro ĝojo de mia diligenta kaj pacienca lektorino klopodis memori kelkajn esperantajn esprimojn – sed mi ne sukcesis. Simple – mi ne havas talenton por lingvoj.

Mi ŝatas Esperanton. Sed mi ne vidas ĝian celon. Kiel mi, diable, veturu malproksimen por babili kun fremdaj homoj? Kaj kial ŝi bezonas tion? Ŝi do havas ĉion hejme: grandan loĝejon por ordigado, televidilon por kulturo, ĝardenon por kultivado, kaj min por zorgado.

Sed ĉio ĉi ne sufiĉas al ŝi. Tiu konstante nekontenta persono bezonas senĉese vagadi ie, kaj se mi ne volas restadi sola, mi devas veturi kun ŝi, forlasi mian sendanĝeran ekziston... pardonu min, mi devas ankoraŭ paki mian vojaĝpakaĵon, ĉar ŝi denove elpensis partopreni ian kongreson aŭ kion, ĉiuj diabloj scias, en kiu infero...

Mária Minichová, Esperantisto Slovaka 2/2006.

Intervjuo kun edzino de esperantisto

Ĉu nia domo estas plena de gastoj? Ne ofte, pli ofte mi estas sola kun infanoj. Jes, esperantistoj vizitas mian edzon kaj kunvenas en nia loĝĉambro. Tio estas terura afero por mi kaj niaj infanoj. En tiu tempo ni ne povas rigardi televidon, la infanoj devas silente sidi en infanĉambro kaj mi devas salti ĉirkaŭ verdaj popoj kaj ridetante demandi: „Ĉu vi deziras kafon aŭ teon?“ Lastfoje en televido oni projekciis argentinan telenovelon kaj mi ne eksciis, ĉu Izabela mortigis sian edzon. Anstataŭ mi sidis kun esperantistoj, kiuj babilis pri stultaĵoj.

Pri kiaj? Nu, rekonu: kio estas normala sur la demando, ĉu en Eŭropa Unio estas uzebla esperanto kiel komuna lingvo? Jam malgrandaj infanoj scias, ke komuna lingvo estas la angla. Angle jam pepadas paseroj, kaj ili deziras uzi Esperanton! Ne, mi ne parolas angle. Kie mi povus lerni anglan lingvon, se hejme mi aŭdas nur pri Esperanto. Pro Esperanto mi ne parolas angle. Iru kun Esperanto inferen. Jes, se mi ne kalkulas esperantistojn, mia domo estas malplena. Kial mi ne kalkulas pri esperantistoj? Miaj najbaroj diras, ke en mia domo ofte gastas homoj, sed ili ne scias, ke tiuj gastoj nur nekompreneble kvakas. Tiun ciganan lingvon neniu komprenas. Jes, vere, Esperanton certe kreis ciganoj. Ankaŭ ili „ĥajĝas“ same kiel esperantistoj „manĝas“. Tre similas. Iru kun esperantistoj inferen. Dum sabatoj kaj dimanĉoj mi restadas hejme sola, mia

edzo partoprenas esperantajn renkontiĝojn. Jes, mi scias, kion ili faras. Prezentas poemetojn, aplaŭdas kaj kantas. Same kiel etaj infanoj. Kaj mi nur kuiras, lavas kaj purigas. Esperanto ŝtelas patron de infanoj kaj virojn de edzinoj. Vera edzino de mia edzo estas Esperanto, mi estas nur servistino, kiu prizorgas vivspacon, por estu bonaj kondiĉoj por evoluo de la internacia lingvo. Mi provis lerni tiun strangan lingvon; multe mi komprenas, nur paroli mi ne kapablas. Mi jesas kun tiu juna politikistino, kiu proponis anglan lingvon kiel devigan lingvon. Se povas angle paroli granda Ameriko, kial ne povas komuniki angle ankaŭ loĝantoj de malgranda lando. Poste vi ekvidus, kiom da gastoj estus en nia lando! Mi ne estos sola, eble ankaŭ Richard Gere gastos en mia domo! Sed nun, vere dirite, mi estas sola, malgraŭ tio, ke mia hejmo estas plena de gastoj. Iru kun Esperanto en inferon!

Ján Vajs, Esperantisto Slovaka, 2/2006

Pripensinda...

Du malsanuloj lamadas al du diversaj hungaraj kuracistaj konsultejoj kaj oni konstatas, ke ambaŭ du malsanuloj devas havi koksoprotezon pere de operacio.

Oni esploras la unuan malsanulon, dum la sekva horo faras rentgenfoton, analizas la foton kaj signas tempon de la operacio, kiu estos sekvan tagon.

La dua malsanulo atendas ĝis atingas distriktan kuraciston, kiu sendas tiun al iu specialisto. Nun la malsanulo atendas la specialiston ok semajnojn, kaj tiu sendas lin al rentgenfoto. La foton oni faras kaj analizas dum unu monato kaj konstatas, ke la operacio estas bezonata. Oni antaŭnotas la operacion kaj post naŭ monatoj faras la operacion.

Kio estas la diferenco inter la du malsanuloj?

La unua estas iu hundo, la dua estas iu homo.

El hungara retĵurnalo
Ilona Böde

Solvinte krucenigmon disdividas Majka Pichová el Držkrajov kun vi belan sloganon:


Rido kostas malpli ol elektro, sed ĝi donas pli da lumo.

Gaŭĉaj popoldiroj

Longa kiel insulto de balbutulo.
Konfuzita kiel hundo en procesio.
Malbela kiel ŝuo de pastro.
Malgranda kiel ĝojo de malriĉulo.
Senmova kiel hundo sur boato.

En Ĉeĥio finiĝis lekado de poŝtmarkoj fine de la aprilo 2010

Anstataŭ la valoro en kronoj aperis literoj



Tio estas la unua marko por enlando - A, desegnita de Jaroslav Němeček. La valoro estas 10 kronoj. Post la altiĝo de poŝtpago, oni ne devos presi novajn markojn.

Sekvos E por eŭropaj landoj kaj Z por landoj ekster Eŭropo.

Bildojn oni transprenis laŭ komiksaj serioj „Kvarfolieto“, de la sama aŭtoro. Ankaŭ sur la aliaj markoj aperos figuretoj de la „Kvarfolieto“: virkato: „Myšpulín“, leporo „Pind’a“, porketo „Bobík“. Sur la unua marko estas hundineto „Fifinka“. La markoj estas memgluantaj.

La nova poŝtmarko aperis subite, sen ia ajn anonco por publiko.

Homoj amase la poŝtmarkojn aĉetas.

Ina vilaĝo jam ekzistas

En norda Kenjo en Afriko estas vilaĝo Umoja, kiu konstante kreskas. Ĉi tie virinoj rifuzis virojn kaj utiligas ilin nur por generigo de idoj kaj de tempo al tempo pro malfacila laboro je salajro.

Kial inoj kreis la vilaĝon?

Antaŭ dudek jaroj komencis kelkaj virinoj entrepreni. Iliaj sukcesoj iritis edzojn kaj ili ekatakis virinojn ne nur vorte. Ankaŭ parto de virinoj ekrifuzis virojn pro la perfortaĵoj de soldatoj. La virinoj ekagis kaj malpermesis al viroj eniron en vilaĝon.

Nun vivas en la vilaĝo ĉirkaŭ 200 inoj. Ili vivtenas per bredado de dombestoj kaj ankaŭ per turismo. Vizitantoj volonte pagas pro trarigardo.

Ona&On názory, 2.11.2009, n. 44 p.42

Ĝenoj kaŭzitaj de la koboldo „SE“.

Jindřiška Drahotová, marto 2010

Post tralego de felietono de Denisa Prošková en gazeto „ONA“ (ŜI) numero 52/2009, mi serioze ekmeditis.

En ĉeĥa lingvo la vorteto „SE“ similas al esperanta „ONI“ kaj „oni“ sonas por ĉeĥo „ili“. Por unua fojo nenio surpriza... Sed eble eĉ vi iomete pripensas la problemojn kun tiu diabla koboldo SE. Nu, legu parton de felietono en traduko:

“Mi ne scias, kiel vi spertas koboldojn, sed en nia familio la koboldo SE ĉikanas min jam kelkajn jarojn. Mi ne scias kiun genron ĝi posedas (en ĉeĥa lingvo ekzistas tri genroj – vira, ina kaj neŭtra), sed ĝi enmiksiĝas en ĉion. La afero komenciĝis, kiam mia filo estis trijara. Li venis al mi kun ĉokoladaj okuloj larĝe malfermitaj, larmeto brilis. En mano li portis urseton kun truon en ventro kaj diris: „ONI faris al ĝi vundeton!“ En tiu minuto mi ne eksciis, ke ekzakte nun venis granda avanco de ONI.

En paso de jaroj SE-ONI desegnis sur muron en necesejo bilaĉojn, ĉar koboldo envenadis en miajn infanojn kaj movigis ilin. Ekzemplo:

Mi – Kiu la lasta elprenis la sukron el la glaciŝranko?

Infano 1. - Mi ne.

Infano 2. - Mi ankaŭ ne, kial?

Mi – Ĉar tiu, kiu ne malfermis glaciŝrankon kaj nenion elprenis, lasis flakon sur la planko.

Silento, kiel en tombo.

Mi – Mi deziras, ke tiu neniŭ movu kaj viŝu.

Infano 1. – Iru vi, mi ne faris.

Infano 2. – Iru vi, mi ankaŭ ne faris.

Mi – Egale por mi kiu trinkis, sed ĝis kvin minutoj viŝu!

Infanoj – Jes, jes, tion ONI viŝos.

Kvin minutoj pasis, la flako restas. SE=ONI iris kunveni, eble en knajpon kun aliaj SE=ONIJ el aliaj familioj kun junularo kaj primokas gaje maljunularajn tavolojn de la socio.

Monaĥoj de Budho estas koleruloj kontraŭ mi, ĉar mi ne kriaĉis, sed per voĉo ŝajne ama mi demandas: „Kaj kiam ONI viŝos?“ (Mi komprenas vin, ke eble pensas pri mi kiel pri harfendema histeriulino. Ĉu mi ne prenu tukon kaj ne viŝu flakon mem, sed laŭ mi, tia konduto ne estas pedagogie ĝusta kaj krome la agresemo povus grandiĝi kaj mi irus per malseka tuko per suko bati kapojn de miaj infanoj, kaj tio estos baldaŭ kontraŭleĝa.)

Infanoj – No, no, Jezu Kristo! Kial troigi? Ni do diris, ke ONI viŝos!

...

ONI enŝovis al filo en lian poŝon skatolon kun kelkaj cigaredoj (mi ne kontrolis, sed volis pantalonon lavi). Kun surpriza mieno filo diris: „Panjo, vere, fakte, mi ne scias kiel ONI enpoŝiĝis.“ Mi estis tiel senpova, ke mi ne kuraĝis plendi ĉe la patro. Jes, estas interese, ke ONI estas iomete timulo. Li kuraĝas pajaci al kvardekjaraj sinjorinoj, sed antaŭ patroj li metas voston inter krurojn kaj forkuras.

...

„Panjo, sinjorino instruistino volas, ke vi iru en lernejon. Kamarado soifis kaj mi ĵetis al li mian botelon, kaj...no...ONI iel miscelis kaj la botelo rompis la novan tabulon. Tio kostos 5.000 kronojn...sed al paĉjo, mi petas vin, tion ne diru. Vi scias, kiel li krius!“

Jes, li kriigus, se mi povus, mi ankaŭ!

...

Repaciĝo kun ONI okazis en drama akcidento. Min faligis aŭtomobilo. Mi kuŝis en gipsa kiraso kun rompita kokso kun minaco, ke mi plu ne paŝos. Sed pli terura estis timo en mia animo. Ĉe ni en Ĉeĥio la realo ne estas kiel en usonaj filmoj, kie edzinoj kaj patrinoj povas paŭzi kaj analizi vivon, ĉar mono, pruntoj, aŭtomobilo, luprezo (ONI) solvas mem. Mi estis indiferenta ĉu hospitala manĝo estas malbona aŭ aĉa, kiel kondutas al mi personaro, kuracistoj...

Venis mia familio. Infanoj estas monstroj maskitaj kiel anĝeloj. Mia sepjara knabeto tute aferece demandis: „Panjo, ĉu vi mortos?“ kaj mi ekkomprenis, ke mi ne mortos, ĉar mi simple ne povas.

„Sed Eĵínek mortis“, (Eĵínek estis hundo de avino) la filo persistis. „Eĵínek estis maljuna kaj pli malsana ol panjo“, klarigis rapide mia edzo. Poste li kisis min kaj diris: „Ne timu, ONI tion glatigos.“ Li ne mensogis. Mi vivas, paŝas, riproĉas al SE=ONI, sed mi kaj koboldo scias sian propran veron.

Ankaŭ mi.

JoDo.

Ĉeĥa gramatika furoro „Gendera problemo“

Sinjorino Michaela Marková Tominová en januara gazeto „ONA“(Ŝi) en felietono „Ĉu povas esti viro direktorino?“ skribas, ke antaŭ nelonge ŝi diskutis kun pedagogoj de bazaj lernejoj. Iu virino diris: „Mi estas instruisto kaj speciala pedagogo.“ Miaj oreloj per teruro turniĝis dolore. Tuj mi imagis, kiel prezentas sin viro: „Mi laboras kiel instruistino.“

Dum komika babilado virinoj multe ridis. Verŝajne plimulto da homoj opinias la problemon bagatela, sed Michaela Marková Tominová plu skribas: „Mi estas konvinkita, ke la lingvo forte influas nian imagon pri roloj de viroj kaj virinoj. La lingvo ĉirkaŭas nin de naskiĝo kaj neniu pensas, kiel ĝi influas nian pensadon, same kiel centoj da objektoj, kun kiuj ni kreskas de infaneco kaj ni kvazaŭ ilin ne sentas. Sed nia cerbo alsuĉas ĉion.“

La ĉeĥa lingvo estas lingvo slava kaj diversas inan kaj viran genron. Nomoj de virinoj havas finaĵon „-ová“, sed ankaŭ nomoj de objektoj portas siajn genrojn – viran, inan kaj neŭtran. Okazis, ke en televida elsendo virino elparolis en sporta raporto eksterlandajn sportistinojn per iliaj nomoj sen –ová, ŝi havis problemojn resti sur sia laborloko! Male havas problemojn la edzinoj de la eksterlandaj edzoj, ĉar ilia nomo ne estas identa kun nomo de edzo en eksterlando.

Estas vero, ke ne ekzistas viraj formoj en nia lingvo por iaj profesioj, kiuj historie faris nur virinoj: „švadlena“ – kudristino, „pradlena“ – lavistino, „nevěstka“ – ĉiesulino, „jeptiška“ – monaĥino, „sestra“ – flegistino, kiu plu estas identa kun vorto fratino, ktp.

Sed ankaŭ viraj profesioj kiel „kat“ – ekzekutisto, „host“ – gasto, „mnich“ – monaĥo, „potomek“ – ido, „anděl“ – anĝelo, portas klaran viran genron, sen eblo aldoni inan finaĵon.

Tio estas pruvo, ke en lingvo estas kaŝita nia vivo, pensado, historio kaj kiu scias kio plu?

Moderna vivo baldaŭ glutos tiujn genderajn, profesiajn problemojn. Estas videble, ke novaj profesioj jam ekestas ĉe ni facile por ambaŭ genroj – same kiel en Esperanto.

Februaro 2010

En la 6-a semajno de la jaro 2010 aperis eĉ en reklama informilo pri varo de granda supermarketo „Kaufland“ artikolo inter anoncetoj kun surskribo: „Ĉeĥa lingvo preferas virojn“. Ŝajnas, ke tiaj problemoj povas kreski kaj okupi instancojn eĉ dum krizo.

Oni skribas: „Ministerio de lerneja edukado, junularo kaj sporto intencas batali por egalrajteco de virinoj kaj komencos per lernolibroj.”

Viran genron en la ĉeĥa oni rigardas kiel substitua. Gramatike tio estas ĝuste, sed el vidpunkto de egalrajteco de sekso ne, tamen ekzemple en jura kazo preskaŭ ĉiu komprenas ke profesio rilatas al viroj aŭ virinoj.

Jana Valdrová el Sudbohemia universitato en České Budějovice skribas en sia bruŝuro: „Pri tio, ke tiaj esprimoj povas preferi virojn kontraŭ virinoj en praktiko, neniŭ pensis ĝis la 90-aj jaroj de la 20-a jarcento.“ Ŝi rekomendas anstataŭ studentoj kaj studentinoj – „studenti a studentky“ – uzi „studující“ – (gestudentoj). Ŝanĝoj aperis sur paĝoj de la ministerio, kie estis ŝanĝita vorto „novináři“ (ĵurnalistoj) al „médiá“, sekvas „učitelé“ (instruistoj), „sportovci“ – (sportistoj), „vědci“ (sciencistoj), ŝanĝitaj al „vyučující“, „sportující“ ktp.

Pri tio diras Kateřina Böhmová el ministerio: „Kredu, ke tia laboro ne estis facila, tamen de la ministerio ne temas pri ordono, nur rekomendo, sed la verkistoj de la lernolibroj la novan uzon atendas. Laŭ analizo de la lingvistino Valdrová nian landon gvidas politikistoj (vira genro), problemojn solvas nur fakuloj (vira genro) kaj naturon savas ekologiaj (vira genro). La ĉeĥa socio estas indiferenta kaj virinoj ne sentas sin persekutataj.

Sed!! Jam en la jaro 1990 Komisiono de Eŭropa Unio taskigis membroŝtatojn prilabori lingvajn rekomendojn por „neseksisma“ (seksegalrajta) esprimado kaj uzo en praktiko. Do ni povas atendi, ke ekzemple venonte ni povos aŭdi anstataŭ „vážení hosté“ (estimataj gastoj) „vážené hostky a vážení hosté“, nu vere komike kaj ne tre ĝentile por virinoj.

Julio 2010

Sur www.valdrova.cz oni skribas: „Kontraŭ al neaj vidpunktoj de ĉeĥaj lingvistoj (lingvistinoj ne reagis), germanaj lingvaj gramatikistoj alliĝas al defio de feminismaj lingvistinoj kiel al pliriĉiĝo de la lingva uzmaniero.“

En magazino „Vikend dnes“ – aldonaĵo de tagĵurnalo MFdnes sur paĝo 39 – oni skribas sub titolo „Naskiĝo kaj malapero“: „Ministerio de edukado, junularo kaj sporto preparis manlibron „Kulturo de gendera subsidiareca esprimado“, konkrete farita de la grupo de la socialaj programoj en lerneja sistemo, sub gvido de Klára Laurenčíková.

Se vi serĉus en paĝoj de la ministerio, aperas nur positiva artikoleto pri ĝi, sed la „manlibro“ malaperis .

J.Drahotová.

Kio/Kiu estas la tiel nomata "Dio"?

Laŭ islamo, el la vidpunkto de Wael H. AL-MAHDI:

Li estas la unua kaj la lasta, la origina, la daŭra, la kreinto, la ĉiopotenca, la ĉioscia, la sol sola estaĵo. Nek homo, nek muta natur-potenco. Li posedas inteligentecon kaj saĝecon, kaj estas fonto de ĉiu spirito. Li kreis la universo el nenio. Verso en la Korano diras pri la eventuala fino de la universo: "Ĉio sur la tero finmortas. Nur restas la Vizaĝo de Dio."

Laŭ la Tria Testamento, el la vidpunkto de Hokan LUNDBERG:

Dio estas la ĉioamplaksa vivanta estulo en kiu ni ĉiuj "vivas, moviĝas, estas kaj ekzistas". Laŭ la Tria Testamento, ĉiuj kaj ĉio estas parto de Dio, do ekzistas nur Dio kaj "difiloj". Se vi imagas lampon ĉirkaŭ kiu estas lampujo kun senfine multe da truetoj kaj ke lumo eliras la truetojn, tiam la centra lumo estas Dio kaj ĉiu unuopa lumero/lumradio estas unu difilo. La konscio de Dio havas du flankojn, unu luman kaj unu malluman kaj ili ambaŭ estas same bezonataj, sen tiuj du ĉefaj kontrastoj la vivo ne povus ekzisti. La difiloj evoluas laŭ spiralciklo ĉiam supren kaj interŝanĝe trairas luman kaj malluman partojn por sperti ambaŭ flankojn de Dio kaj tiel eterne renovigas sian konscion. (Unu spiralciklo konsistas el ses regnoj: minerala, planta, besta, homa kaj du pure spiritaj.) Ĉiuj vivaj estuloj havas mion kiu gvidas kaj spertas, kreokapablon kie situas niaj talentoj pri kreado kaj spertado, kaj kreitan organismon per kiu ni povas interagi kun aliaj. Ankaŭ Dio havas saman strukturon, nur ke ties mio, kreokapablo kaj kreita organismo konsistas el ĉiuj mioj, kreokapabloj kaj kreitaj organismoj de ĉiuj aliaj vivaj estuloj.

Laŭ judismo, el la vidpunkto de Erinja M. PIATESKI:

Dio estas la povo kiu kreis la universon kaj regas la universajn leĝojn kaj la aferojn de la universo.

Laŭ budaismo, el la vidpunkto de Oleg IZJUMENKO:

Ekzistas krom homoj aliaj pli evoluintaj estaĵoj kiel dioj, asuroj, budaoj, bodisatvoj, arjoj kaj aliaj. Dioj, ekzemple, ĝuas pli plezuran vivon ol homoj, sed ankaŭ ili ne estas liberaj de sufero kaj post ioma tempo devas reenkarigi en unu el ses mondoj (de plezuremaj kaj prosperantaj dioj, de enviemaj kaj militemaj asuroj, de ĉiam malsataj spiritoj, de homoj, de bestoj, aŭ de turmentatoj en infero). Ili certe ne estas ĉionpovaj estaĵoj kiel kristana Dio, ili ankaŭ ne estas kreintoj de la universo. Asuroj similas al dioj, sed estas posedataj de envio al dioj kaj deziro konkeri ilian mondon; ili do estas tre militemaj. Budaoj estas ĉionsciaj, sed ne ĉionpovaj estaĵoj, kiuj sukcesis liberiĝi de sufero kaj kompreni la veran naturon de ĉio. Budaoj ne plu devas renaskiĝi en iu el ses mondoj, ili tamen povas helpadi al aliaj estaĵoj atingi nirvanon. Bodisatvoj estas tiuj, kiuj strebas ĉiel helpi al aliaj estaĵoj ĉesi suferojn kaj atingi feliĉon (nirvanon).

Ekzistas bodisatvoj inter homoj kaj inter pli superaj estaĵoj "arjoj". Arjoj estas superaj estaĵoj, kiuj estas sur la vojo al nirvano. Homo povas iĝi arjo dum sia homa vivo. Homo ankaŭ povas iam renaskiĝi kiel dio.

Laŭ Oomoto, el la vidpunkto de Yas KAWAMURA:

La kreinto de ĉio. Animoj ankaŭ estas unu aperformo de la kreinto.

Laŭ spiritismo, el la vidpunkto de Bertrand HUGON:

Dio estas la superega intelekto, primara kaŭzo de ĉiuj estaĵoj. Al la homo ne estas eble atributi la intiman naturon de Dio. Por kompreni Dion ankoraŭ mankas al ni la koncerna sentokapablo, kiun ni ne akiras krom per la kompleta elpuriĝo de la Spirito. Sed se li ne povas penetri la esencon de Dio, la homo akceptante lian ekziston kiel premison, povas per rezonado ekkoni liajn necesajn atributojn: komprenante tion, kio li ne povas esti, ĉar li tiel ĉesus esti Dio, la homo induktas tion, kio li ja estas.

Laŭ kristanismo, el la vidpunkto de Gerrit BERVELING:

La granda mistera forto sur kiu baziĝas ĉio, kaj kiu daŭre defias nin homojn por ke ni strebu al mondo pli bona.

Laŭ la natursciencoj, el la vidpunkto de Amri WANDEL:

Dio estas la kialo por la ekzisto de ĉio, laŭ la persona kredo aŭ interpreto. Ĉar dio estas supernatura koncepto, ĝi ne devas esti traktata per la rimedoj de naturscienco, kaj ne konfliktas kun la sciencaj klarigoj.

Laŭ bahaismo, el la vidpunkto de Diano LUKES:

Bonvole notu: en la jena klarigo ĉiuj referencoj al Dio estas kiel 'li' kaj ne kiel 'ŝi' aŭ 'ĝi'. Tio ĉi signifas ke la Dio estas estaĵo pli ol objekto. Certe, Dio transas koncepton de sekso! Bahaa kredo instruas ke Dio ĉiam estis sola kaj nekomprenebla. Li transcendas la priskribon de ĉiu ajn krom li mem kaj ĉies komprenon escepte lian propran. Dio sufiĉas al ĉio kaj super ĉio, kaj nenio en la ĉielo nek sur la tero krom Dio sufiĉas. Li estas en si mem la scianto, la subtenanto, la ĉiopova. Oni povas havi etan komprenon pri Dio pro tiuj ĉi atributoj; nur Dio estas la ĉionpova, la mem-ekzistanta, la donanta, la pardonanta, la senkulpiganto, la ĉioscia, la ununura kreanto, la protektanto, la gardanto, la konservanto, la sufiĉanto, la amanto, la kompatema el la plej kompatemaj!

Laŭ ateismo, el la vidpunkto de Rick MILLER:

"Dio", laŭ mia opinio, estas sopirata fikcio. Homoj nature deziras certecon, sekurecon, gvidecon, helpon, kaj tiel plu. Nemulte da personoj povas toleri la ideon ke ni ne havas pli altan helpanton.

Kiel kreigis la universo ?

En http://sv.lernu.net/kursoj/lmo/komentoj_kaj_poentoj.php oni povas legi pri la kredo de dek mondrigardoj/religioj. Troviĝas dek diversaj temoj. La unua nomiĝas: **Kiel kreigis la universo ?**

Ĉar interesas min ankaŭ malnovaj mitoj, mi enmetas la suban kreadomiton de boŝmanoj (el «La Kalumeto», revuo de PIP – Projekto Indiĝenaj Popoloj), kie arbo havas grandan rolon. Ankaŭ en la nordaj mitoj troviĝas arbo (Leginda libro: «La frakseno Igdrasil» de Alf Henriksson kaj Edvards Lindahl. Tradukis Bertil Nilsson).

Siv Burell, Svedujo, 2010.

Boŝmana kreado-mito

Laŭ la kreado-mito de la boŝmanoj de suda Afriko, homoj kaj bestoj iam vivis en la interno de la Tero. Ili loĝis kun la granda majstro kaj sinjoro de la vivo, Kaang. Ĉe la mondo-interno, homoj kaj bestoj pace kunvivis. Ili komprenis sin unu la alian, al neniu mankis io ajn, kaj estis sufiĉe da lumo, kvankam la suno estis ekster la Tero, kaj pro tio nevidebla al la homoj kaj bestoj.

Kvankam ĉio bone funkciis, Kaang deziris aliigi sian kreaĵon; li decidis terosurfaceniĝi la homojn kaj bestojn. Kaang kreigis grandegan kaj mirindan arbon. Ĉe la arbobazo li fosis grandan truon kiu atingis la terointeron kie estis la homoj kaj bestoj. La homoj baldaŭ foriris el terointerno kaj grupiĝis ĉe la arbobazo kun Kaang. Poste, Kaang helpis la bestojn por ke ili surfaceniĝu, kvankam kelkaj bestoj kapablis sendepende eksteriĝi laŭ la branĉoj de la arbego.

Kaang instruis al la homoj kaj bestoj por ke ili pace kunvivu. Li avertis al la homoj ke ili ne ekbrulu fajrojn pro tio, ke se ili faros tion, malbonegaĵo okazos al ili. La homoj tiel ĵuris. Kaang tiam foriris por gvati la vivestaĵojn de sia kaj ilia nova, tersurfaca mondo. Kiam la suno alproksimiĝis sian subiron, la homoj ekpensis ke unuafoje ili travivos senlumecon. Ili timegis pro sia venonta nekapablo vidi unu la alian, kvankam la bestoj povis senlume vidi. La homoj pro

timo forgesis sian ĵuron al Kaang; ili ekbrulis fajrojn. Pro siaj fajroj la homoj sentis varmecon kaj vidis unu la alian. Tamen, la fajroj timigis la bestojn. La bestoj ekforkuris, serĉante loĝlokojn malapudajn kaj sekurajn. Ekde la unua tago de tersurfaca vivo la rilato inter homoj kaj bestoj, antaŭe amikema, iĝis timema.

Fonto: La Interreto: African Bushmen Creation Myth

KIEL KREIĜIS LA UNIVERSO

<http://sv.lernu.net/kursoj/lmo/komentoj>

Respondo laŭ ateismo, el la vidpunkto de Rick MILLER:

Laŭ mia opinio, la respondo estas simple ke ni ne povas scii certe, ĉar ni ne povas esplori la neobservitajn eventojn de la pasinteco. Eble tiu ĉi demando ne estas valida. Ni scias ke tempo, spaco, materio, kaj energio interdependas, ke neniu ekzistas sen la aliaj. Oni ne povas demandi: "Kio okazis kiam tempo ne ekzistis?" ĉar la demando estus malracia. Tamen, kiel ajn la universo ekeksistis, ni kredas, ke ĝi sekvas kompreneblajn metodojn.

Respondo laŭ bahaismo, el la vidpunkto de Diano LUKES:

La universo daŭre kaj senhalte estas kreata. La kaŭzo aŭ rezono de la procezo de la kreado estas revelaciita de Baha 'u' llah. Li klarigis ke Dio deziris konigi sin al la homoj; tial li ekestigis la kreaĵaron kaj formis la universon. La universo daŭre ŝanĝiĝas laŭ la naturleĝoj fonditaj de Dio, la ĉiama kreanto. Tiu ĉi procezo de kreado la sciencistoj nomas 'evoluo'.

Respondo laŭ budaismo, el la vidpunkto de Oleg IZJUMENKO:

Ni ne scias. Ĉar budaismo estas praktika instruo, rezonadoj pri kiu kaj kiel kreis la universon ne multe helpas al suferantaj homoj. Pli gravas tio, kio okazas nun kaj ĉi tie. Ĉiu homo povas havi proprajn ideojn pri tio kiel kreiĝis la universo, sed ili ne serĉu respondon en budaismo.

Respondo laŭ islamo, el la vidpunkto de Wael H. AL-MAHDI:

Dio kreis la universon en la 'komenco', aŭ antaŭ la konceptoj de 'komenco' kaj 'fino'. Li kreis ĝin el nenio, simple per diri la vorton 'Kun!' = Estu! Alaho

signifas La Dio, li estas Dio en la juda-kristana tradicio. La akto de kreado supozeble daŭris 6 tagojn.

Respondo laŭ judismo, el la vidpunkto de Erinja M. PIATESKI:

Laŭ mi, Dio kreis 'universeron' kaj kreis la leĝojn de fiziko. Okazis la granda eksplodo kaj el tiu ero fariĝis la tuta universo. En judismo estas diversaj vidpunktoj - kelkaj judoj kredas ke Dio kreis la teron kaj la universon dum 7 tagoj. Mi sekvas la vidpunkton de fama mezepoka rabeno, kiu opiniis ke se ŝajnas esti konflikto inter la Torao (la juda sankta libro) kaj scienco, do aŭ nia kompreno de la scienco estas erara, aŭ nia kompreno de la Torao estas erara.

Respondo laŭ kristanismo, el la vidpunkto de Gerrit BERVELING:

Mi kredas, ke Dio kreas la mondon : Li / Ŝi - ĉar Dio ne estas homo, sekve ne viro aŭ virino - estas la Kreanto. Tio ne signifas ke mi supozas scii kiamaniere Dio kreas / kreis. La scienco instruis al ni, ke okazis gigante longa evoluo-procedo antaŭ ol estis atingita la nuna stadio de la mondo (universo). Tre povas esti, ke tio estas bona scienca tezo, sed por mi persone multe pli gravas la religia nocio (fido), ke ĉion iniciatis nur Dio.

Respondo laŭ la natursciencoj, el la vidpunkto de Amri WANDEL:

La scienca bildo diras, ke la universo ekestis antaŭ ĉirkaŭ 14 miliardoj da jaroj, per granda eksplodo (la pra-eksplodo, aŭ PEKO; angle Big Bang). Laŭ tiu modelo, en la komenco la universo estis en tre varma kaj densa stato, kaj de tiam ĝi daŭre ekspansiis, malvarmiĝis kaj maldensiĝis. Komence la spaco estis plena de homogena varmega materio kaj radiado. Kiam la aĝo de la universo estis ĉirkaŭ unu miliardo da jaroj aperis la unuaj galaksioj kaj steloj. Tiu bildo baziĝas je pluraj observoj, la ĉefaj estas la malproksimiĝo de la galaksioj kaj la kosma mikro-onda fona radiado. Se oni mezuras la rapidecon kaj la distancon de la galaksioj, eblas kalkuli antaŭ kiom da tempo ĉiuj galaksioj estis tre proksimaj unu al la alia, kiam la ekspansio komenciĝis. La rezulto estas la aĝo de la universo. Uzante la konatajn leĝojn de fiziko kune kun tiuj observoj eblas akurate priskribi la historion de la universo ekde la unua sekundero, sed ne pli frue: ni ne povas respondi la demandon kio estis antaŭ la pra-eksplodo aŭ kial ĝi okazis. Tiuj demandoj apartenas al la reĝimoj de filozofio kaj teologio. Tamen la scienca bildo kaj la religia ne kontraŭas unu la alian, ĉar la religia bildo estas simbola, interna koncepto kaj ĝi ne devas esti taksata per sciencaj mezuroj.

Respondo laŭ Oomoto, el la vidpunkto de Yas KAWAMURA:

Estis unu punkto (ekzistas speciala nomo pri ĝi), kaj la kreinto vokis la vokalojn a o u e i, kaj poste 75 silabojn la kreinto aldonis kaj la universo estis farita.

Respondo laŭ spiritismo, el la vidpunkto de Betrand HUGON:

La universo ne kreis sin mem. Dio kreis ĝin. Kiel? Uzante ian esprimon, mi diras: per Sia volo. Nenio havigas pli bonan ideon pri tiu ĉiopova volo, ol jenaj belaj vortoj de Genezo: "Dio diris: Estu lumo; kaj fariĝis lumo."

Respondo laŭ la Tria Testamento, el la vidpunkto de Hokan LUNDBERG:

Ĝi ne kreiĝis. Laŭ la Tria Testamento, io ne povas kreiĝi el nenio. Tio signifas ke la universo neniam kreiĝis, sed ĉiam ekzistas. Samlogike io ne povas fariĝi nenio, el tio sekvas ke la universo ĉiam ekzistos. Konklude la universo ne havas komencon, nek finon, ĝi do estas eterna." Sed kio pri la praeksploda (Big Bang) teorio?", vi verŝajne nun pensas. Bona demando! Tiu teorio ne estas rekte traktata de Martinus (la verkinto de la Tria Testamento), sed ĉar liaj analizoj montras, ke ĉio viva ekzistas en io pli granda viva, devas esti tiel, laŭ tiu logiko, ke kiam la praeksplodo okazis, "naskiĝis" la "subuniverso", kiun ni (niaj sciencistoj) povas pritrakti. Sed ekster "nia universo" ekzistas pli granda universo, kiu siavice ekzistas en io ankoraŭ pli granda, ktp. La universo kiel ĈIO kio ekzistas, kiel "mondotuto", estas do kaj eterna kaj senfina. Ĉu sonas strange? Verŝajne jes, sed provu pensi pri kiel estu, se la universo ne estus senfina, kio do ekzistus "ekster" ĝi?

Ĉu la diversaj eldiroj vere reprezentas siajn mondrigardojn kaj religiojn mi ne scias. Troviĝas ja nuancoj ene de ili.



Pri naciismo

Milan Augustin, Karlovy Vary, Ĉeĥio

Ĉiam min ekscitis kaj riĉigis la scio, ke estas eblo kompreniĝi ne nur kun samlandano, sed ankaŭ kun homo, kiu devenas el alia lando, vivanta per plimalpli aliaj moroj kaj kutimoj. De mia vidpunkto pri komuna vivo estas demando pri nacieco sengrava – mi ĉiam nur demandas: kia vi homo estas? Oni povis tiel demandi en antikva Grekio, dum mezepoko, hodiaŭ eĉ en venonta jarmilo. Mi povas tiel demandi en amerika ĝangalo, azia stepo, afrika dezerto aŭ eŭropa urbego. La respondo ĉiam fortigis mian opinion: nacieco en dudekunua jarcento estas anakronismo, ĉar homo ofte pli bone interkompreniĝos kun ĉino bonkora, ol kun najbaro en komuna domo, kiu estas samnaciono, sed ne volas lavi ŝtuparon.

Kiel mi mem sentas mian naciecon? En mia pasporto estas enskribita ĉeĥa nacieco kaj la ĉeĥa lingvo estas mia gepatra lingvo, sed kion vi atendus de la homo, se lia patrino naskiĝis en Levoĉa en Slovakio, patro naskiĝis en Moravio (orienta parto de Ĉeĥio) kaj mi mem naskiĝis en Sudeto (nordokcidenta parto de Ĉeĥio), en loko, kie longtempe vivis germanoj? Kion vi atendus de la homo, kiu ŝatas historion kaj ion scias pri teruraĵoj en dudeka jarcento pro ideologio nomata naciismo, nutrata per ideo „nacio“? Kion vi povas atendi de la homo, kiu ĉiutage vidas en televido mortajn virinojn kaj infanojn, perfortaĵojn, murdaĵojn, torturojn nur pro tio, ke iu havas difinan naciecon?


Mi povas fieri pri tio, kion mi bonfaris por aliaj, sed tio rilatas al mia personeco, nur poste tio rilatas al mia (sengrave) nacieco.

Mi konsentas, ke nacieco rolis en historio eĉ pozitivan rolon, sed tio estas afero de pasinteco, ne hodiaŭ. Nur al nuran naciecon mi aliĝus, se ĝi ekzistus – al la TERA.

Mia nura mezurilo – libereco, demokratio, vivi kun propra nomo kaj devo de respondeco.

Rezulte por mi: En finiĝo de Ĉeĥoslovakio mi ne vidas tragedion, se mia mezurilo daŭros.

Tradukis J.Drahotová



BAZA PROBLEMO DE LA E-MOVADO

Zlatko Tišljar, januaro 2010

estas manko de profesia laboro. Profesia laboro signifas:

- a) okupiĝi pri mono kaj povi investi
- b) sukcesi prizorgi longtempe postulajn projektojn kaj kunlabori kun seriozaj instancoj.

Por profesie labori kaj ricevi monon oni devas produkti (oferti) ion, kion la monhavantoj volas pagi! Kion la esperantistoj posedas? Superaveraĝan scion. Tial ni povas oferti servojn al ŝtataj instancoj rilataj al kapablo de niaj homoj. Ni serĉu kio estas komuna al nia celaro kaj EU? Laŭ mi, esperantistoj volas integri, pliunuecigi la mondon. EU volas integri, pliunuecigi Eŭropon. Ĉu tio ne estas unu ŝtupo sur la vojo kiun havas la esperantistoj? Ĉu ni ne devus kompreni la konstruadon de EU kiel laboron en kiu ni kunpartoprenu kaj por tio ricevu monon?

Multaj esperantistoj vidas EU-on kiel iun danĝeran monstron kiun ili ne volas helpi kreski. Sed tio estas ilia subjektiva rigardo, ĉar kiun alternativon ni havas se ni ne volas konstrui EU-on? Alia perspektivo estas anarkisma detruado de tio kion ni "supozas" malbona aŭ resti neinteresita kaj lasi ke la karavano pasu apud ni. Ĉu detruadi (revolucii) aŭ konstruadi (kontribui al evoluo)? Mi elektas la duan.

Ekz. ĝuste nun Maja kaj mi ellaboras monprojekton por EU pri konferenco en Hamburgo "Kia estus nuntempe Eŭropo, se EU neniam estus fondita?". Nia ideo estas tre ambicia. Ni volas venigi al tiu konferenco plurajn antaŭajn ŝtatprezidantojn. Pri tia ideo volas aŭskulti eĉ politikistoj de la plej supera rango kaj mi estas sufiĉe konvinkita ke ni ricevos aprobon. Kion ni havos de tio? Oni tute ne parolos pri Esperanto, Esperanto estos nur unu el laborlingvoj. Multon. Oni ekkomprenos ke esperantistoj estas kvalitaj kaj kapablaj homoj kaj utilaj partneroj. EEU gajnos prestiĝon. Oni ricevos monon kiu ebligos al ni havi profesiulo(j)n kiuj organizos aliajn aranĝojn interesajn por EU...

Post kelkjara laboro ĉiuj kiuj rilatos kun ni akceptos nin kiel utilan partneron en certa laborsektoro kaj neniu plu dubos ke Esperanto estas serioza afero. Venos tempo kiam ili (la aliaj) komencos mem interesiĝi pri Esperanto. "Ni vidas ke vi bone funkcias uzante Esperanton. Diru al ni iom pli pri tio!".

Lingva politiko en Eŭropa Unio

Jozef Reinvar, jozef_Reinvar@foreign.gov.sk
2009 Slovakio

La lingva politiko en Eŭropa Unio (EU) estas ekstraordinare politike tikla temo. Ĝi fariĝis tabuo jam en la komenco de la eŭropa integriĝo en 1957, kiam 6 fondantoj de la Eŭropa Ekonomia Komunumo (EEK) komencis integriĝi en la ekonomia tereno. Ili ne dediĉis politikan atenton al paca kaj kultura dimensio, por krei firman politikan bazon – „politikan union“ – por plua integriĝo de la eŭropa komunumo. Enkadre de kreado de „politika unio“ devis la fondolandoj (kun 4 oficialaj lingvoj) de EEK formuli komunan justan politikon por doni respekton al ĉiuj lingvoj (ne nur al oficialaj) kaj kulturoj de ĉiuj nacioj kaj etnoj en la komunumo.

Pro historiaj kialoj, politikaj disputoj kaj problemoj inter ŝtatoj kaj nacioj pri lingvopolitikaj temoj la fondolandoj interkonsentis nur pri la formala deklaro en primaranĝo (Roma trakto) de lingva kaj kultura egalrajteco, ke ĉiuj oficialaj lingvoj kaj laborlingvoj de EU kaj tutan lingvan kaj kulturan leĝkreadon lasis al la nacia nivelo, en kompetento de membroŝtatoj.

Konsekvencoj de tiu ĉi politika eraro estas evidentaj en EU nuntempe. Post pluraj vastigoj la nombro de EU membro-ŝtatoj kreskis ĝis nunaj 27 landoj kaj 23 oficialaj lingvoj. Kune kun la plivastigoj kreskis kaj amasis ankaŭ lingvopolitikaj problemoj. Precipe post du lastaj plivastigoj de EU je 12 novaj landoj la lingvaj problemoj fariĝis malfacile manaĝereblaj en la EU institucioj pro nepreciza kaj multtekosta interpretado (inter 23 lingvoj ekzistas 506 interpretkanaloj) kaj tradukado. Nur rektaj kostoj de tradukservoj faras 1,1 mild. da eŭroj jare. EU politikistoj klopodas bagateligi tiujn ĉi elspezojn de plurlingvismo en EU institucioj, ke tio estas nur 2,30 eŭroj jare je unu civitano, kio estas prezo de unu kafo. Ili ne diras, ke en la sumo ne estas enkalkulitaj nerektaj kostoj, kiuj koncernas pliajn servojn helpantajn al tradukistoj kaj interpretistoj. La vera sumo estas pli multe alta. La lingvopolitikaj problemoj koncernas ĉiujn terenojn de la komunumo, pliajn komuniknivelojn kaj ĉiujn civitanojn.

Nuntempe, kiam EU suferas pro financa kaj ekonomia krizo kaj serĉas financajn rimedojn kiujn eblus ŝpari, necesus atentigi politikistojn pri la studo de prof. Francois Grin el la Universitato de Ĝenevo. En la studo li prezentas ekonomiajn faktojn de la nuntempa libermerkata lingva politiko de EU. Malgraŭ siaj deklaroj pri subteno de lingva egalrajteco kaj plurlingvismo, EU en sia lingva politiko toleras kaj per siaj agoj kaŝe subtenas dominadon de la angla, el kiu grave profitas unu lando. La ekonomio de la Granda Britio gajnas jare 17 mld. eŭrojn de ĉiuj EU landoj (krom Irlando) kaj iliaj civitanoj. Prof. Grin prezentis en sia studo ankaŭ optimalan kaj justan solvon, en kiu EU povus ŝpari en sia komunuma budĝeto 25 mld. eŭroj jare, se ĝi donus rolon al Esperanto. En

tiu ĉi sumo estas enkalkulitaj kostoj de la tradukservoj de EU-institucioj (pro demokratio) kaj la komerca vivo en 27 EU-landoj. Ni povas demandi politikistojn de la EU-landoj, ĉu iliaj landoj volas daŭre kontribui al la ekonomio de la granda riĉa lando kaj subteni per tio maljustan lingvan politikon de EU, kiu kontribuas al diskriminado de siaj civitanoj? ([http://cisad.adc.education.fr/hece/documents/raport Grin.pdf](http://cisad.adc.education.fr/hece/documents/raport%20Grin.pdf))

Pro kresko de la lingvaj problemoj en la vastigita EU kaj kritiko de la membroŝtatoj pro limigado de uzataj lingvoj en komunikado je nivelo EU institucioj kaj civitana nivelo, la Eŭropa Komisiono lanĉis fine de la jaro 2005 kampanjon por preparado de EU strategio por subteno de plurlingveco de civitanoj (kiuj devas krom gepatra lingvo studi 2 fremdajn lingvojn). EK en septembro 2008 aperigis dokumenton „Plurlingvismo: devizo por Eŭropo kaj komuna daŭrigo“, kiu estas prezentita kiel kadro por plurlingvismo kaj rekomendita por aprobo de EU membroŝtatoj kaj institucioj. Malgraŭ multaj konferencoj, prezentitaj studoj kaj materialoj, kiujn organizis EK kaj pliaj institucioj pro plibonigo de la plurlingvismo en diversaj niveloj, la rezultoj ne estas kontentigaj kaj la efikeco de lingvoinstruado estas malgranda malgraŭ grandaj investoj de financoj kaj tempo.

En tiu ĉi kunteksto ni devas atentigi politikistojn kaj fakulojn pri la projekto „Lingvolanĉilo“ „*Sprinboard to Languages*“ www.sprinboard2languages.org, kiu efektivigis en Granda Britio en 5 bazaj lernejoj, kiuj jam uzas mallongan kurson de Esperanto por plibonigi ĝenerale lingvolernadon kaj kie la lernantoj atingas tre pozitivajn rezultojn. Kiel plia pozitiva ekzemplo de utiligo de Esperanto en lingvoinstruado povos esti prezentita ankaŭ antaŭnelonge aprobita projekto E@I pri la eduka agentejo de EU, kiu donis al la projekto grandan financan subtenon por instrui la slovakon lingvon.

En la lasta tempo en EU akriĝis lingvopolitikaj kaj kulturaj interretaj konfliktoj, enlandaj (ekzemple en Belgio, Hispanio), dulandaj (inter Slovakio kaj Hungario) kaj regionaj. En EU kaj aliaj landoj kreskas naciismo, ekstremismo, ŝovinismo kaj ksenofobio. Tiu ĉi negativa evoluo signifas por EU/Eŭropo kaj la plua eŭropa intergrigo gravan danĝeron. La situacio ne devus evoluigi en tiu ĉi staton, se EU membroŝtatoj en la komenco de la eŭropa integriĝo interkonsentus pri politike gravaj dokumentoj de „politika unio“ kaj enkadre de ĝi pri komuna lingva kaj kultura politiko, kun klare formulitaj lingvaj kaj kulturaj principoj, reguloj kun rajtoj kaj devoj por ĉiuj civitanoj. Tiuj ĉi dokumentoj povis kontribui al kreado kaj plifortigo de komuna eŭropa konscio kaj identeco respektata ĉiujn identecojn (lingvojn kaj kulturojn) de civitanoj.

En la nuntempa lingvo-politiko kaj kultura situacio, ĝenerala stagnado kaj necerteco de la eŭropa integriĝo, ni, esperantistoj, havas gravajn taskojn informi politikistojn kaj la publikon pri neceso listigi lingvopolitikajn kaj kulturajn temojn al prioritatoj de EU kaj lanĉi tuteŭropan kompleksan diskuton pri

lingvopolitikaj kaj kulturaj problemoj, kiu gvidus al formulado de justa komuna lingva politiko por unuiĝanta Eŭropo. Dušan Čaplivič, vicĉefministro de Slovakio, estis kuraĝa kaj sendis en marto 2007 sian leteron al ĉiuj EU komisionanoj kaj ministroj de eksteraj kaj eŭropaj aferoj, en kiu li invitis ilin al tuteŭropa diskuto pri lingvopolitikaj problemoj kaj formulado de nova lingva politiko por unuiĝanta Eŭropo. Lia iniciato estas eĉ pli aktuala nuntempe.

Ni scias, ke en nova lingva politiko de EU, povus Esperanto ludi gravan lernfaciligan kaj unuiĝantan rolon. Ni konvene kaj kuraĝe informu homojn ekster nia movado pri niaj pozitivaj spertoj. Ni prezentu ekzemplojn, projektojn, pere de kiuj Esperanto jam nun kontribuas al pli facila lingvolernado, interreta reciproka interkompreniĝo, paca kunvivado kaj amikeco en Eŭropo kaj en la mondo,

Ekonomio malsanas pro neefika komunikado.

D-ro Pavel Lehký, E-Lingvo, Ĉeĥio

Multaj personoj kutime pensas, ke lingvoj estas utilaj nur por interkompreno kun amikoj, en familio kaj kun aliaj homoj en la socio. (Facile komuniki kun amikinoj povas esti tre agrabla, ĉu ne?)

Tamen la lingvoj estas prioritaj por la ekonomio. En la ekonomio la komunikado estas ĉio! Vero estas, ke tiu fakto ne estas ĝenerale konata al publiko. Eĉ ekonomoj ne studas influon de lingvoj je kvalito de komunikado en ekonomia sfero. Tio konfirmis al mi pasintjare fama Usona ekonomo profesoro B.R. Chiswick de Chicago!

Dumvive li esploras influon de lingvoj ĉe enmigrintoj kaj ĉe iliaj infanoj je la vivsukceso en la nova lando. Li ne scias pri ia ajn signifa esplorado pri influo de lingvoscia nivelo je ekonomio. Kompreneble la lingvo ne estas problemo en Usono, ĉar tie ĉiu parolas per angla lingvo.

Alia situacio regas en Eŭropo, kie ni havas tro multajn lingvojn. Historie oni al kutimiĝis al nekomunikado kaj oni pensas neniam pri la sekvoj. Vi povas nur pripensi, ĉu Usono estus la plej granda ekonomio de la mondo, se ĉiu el la kvindek iliaj ŝtatoj havus alian lingvon? Certe ne! Sed kontraŭe, en Eŭropo oni uzas tro multajn lingvojn.

Rezulto estas, ke neniuj en internacia komunikado en Eŭropo komprenas perfekte, kaj gravaj informoj ne fluas sufiĉe bone inter personoj, institucioj kaj firmaoj.

Hodiaŭ amasego de sciencaj kaj aliaj informoj kreskas eksponente. Tio signifas, ke por labori efike, la spertuloj devas kunmeti ege grandajn kvantojn de variaj informoj. Tio necesas pli da tempo ol frue. Tio ankaŭ plilongigas tempon de kompetenco de la spertoj kaj daŭro de laborebleco reduktiĝas. Tio plialtigas la kostojn kaj malaltigas la nombron de pozitivaj rezultoj. Ĝi havas gravajn konsekvencojn je la ekonomio.

Por tio la plej gravaj homaj projektoj ne estas solvataj. Ni povas mencii AIDSon, kanceron, akvon, energiajn problemojn k.t.p.

Hodiaŭ la plej granda fonto de informoj estas la interreto. Ĉu la serĉado de informoj tie estas efika?

Pro la lingvaj problemoj efika interreto ne estas ebla!

Enkonduko de interreto faris vere ekonomian prosperon praktike en ĉiuj sferoj de homa agado. Tiu ĉi nova maniero de komunikado rapidigis trafluon de informoj multoble, kaj tio ebligis multajn tute novajn aktivecojn, kaj esence efektivigis tiujn tradiciajn.

La interreto ne estas fakte io alia, ol reto de virtualaj drataj konduktiloj, en kiuj fluas informoj de ĉiuj specoj. La plimulto de ĉiuj informoj estas en la angla. Ĝi estas do je dispono, sed nur por tiuj, kiuj la anglan bone mastrumas. Kaj ĉar la informfluo estas grandega, la scio de la angla lingvo devas esti tre bona, alie tiuj informoj multe ne trafluus. Rapideco de perceptado kaj komprenado en la angla devas esti ege grandaj, konsidere ke necesas elekti nur valorajn informojn, sen balasto. Pro tio la legantoj de interretaj informoj devas legi en diagonalo kaj selekti nur la interesajn poziciojn en la studitaj tekstoj.

Ĉiu, kiu ne posedas tiun povon ne povas hodiaŭ labori efike. Por nedenaskaj lernantoj de angla lingvo tio ne estas akirebla sen multjara intensa studo. Sed naŭdek procentoj de planeda loĝantaro tian ĉi kapablon ne havas, tial do la informojn fakte ne povas uzi. Rilate al la malfacileco de la angla oni ne povas reale atendi, ke bonan lingvoscion de la angla atingos pli ol malgranda tavolo de loĝantaro en ĉiu nacio.

Sed la situacio radikale ŝanĝiĝus, se anstataŭ la angla estus uzata nova komuna lingvo, kiu ne havus la problemojn de la angla, kaj estus facile lernebla fare de plimulto de loĝantaro de Eŭropo kaj de la planedo. Sekve la naŭdek procentoj de homoj povus kontribui kaj uzi la grandan komunan trezoron de homa scio.

Per tio oni atingus kvalitecan salton, ankoraŭ pli granda, ol la enkonduko de la interreto mem.

La rezultoj gigante kaj ĉiuaspekte influos ne nur Eŭropan Union, sed la tutan planedon, kaj per tio ankaŭ pluan evoluon de la homaro.

Pro la multlingveco kaj pro la superrego de la angla lingvo la enkonduko de informoj al socio estas neebla.

La memorkapacito de homa cerbo estas limigita kaj ni ne povos memorteni ĉiujn necesajn informojn por bone solvi kompleksajn problemojn. Oni provas solvi tion kun la laboro en teamo de specialistoj. Tio estas utila, ĉar pluaj informoj povas akumuli, sed ĉiu scias, ke la kreativa eltrovaĝo ekestas nur ĉe la unua konkreta kapo.

Ekzemple pripensu, ke ajna ĥemiisto povas bone scii ĉirkaŭ cent ĝis maksimume du cent ĥemiajn reakciojn. Kaj, ĉirkaŭ dek unu mil ĥemiaj reakcioj estas konataj. Tio montras, ke la kreiva scipovo de spertuloj estas tre grave limigita. Ankaŭ teamo de fakuloj ne kapablas atingi la necesan kaj tre ampleksan akumulon de necesaj informoj.

La tendenco de la evoluo gvidas nin nehaltigeble al „informita socio" kaj al la artefarita intelekto. La fluo de informoj pli kaj pli influos nian vivon kaj do nepre la ekonomion. Se ekzistas tri dekoj da naciaj lingvoj en Eŭropo, sen facila komuna lingvo por komunikado, estas la transdonado de informoj neebla.

Enkonduko de la interreto komencis la revolucion, kiu tute esence ŝanĝis nian vivon. Ĝi proponas multajn pluajn eblecojn ankaŭ en estonto. La fakto restas, ke nur ĉirkaŭ 10 procentoj de loĝantoj kapablas tiujn ĉi informojn uzi, ĉar plimulto de ili estas en la angla. Ŝanĝego okazus, se plimulto da informoj estus en la komuna lingvo kaj alirebla por 90 procentoj de la uzantoj. Tio ankaŭ signifus, ke 90 procentoj de la homaro povus kontribui kaj ne nur 10 procentoj, kiuj hodiaŭ scias la anglan lingvon.

La revolucio, kiu poste aperus, havus grandegan influon je evoluo de ne nur Eŭropo, sed ankaŭ je la tuta mondo.

Kiel taksi la neefikan komunikadon en ekonomio?

Tio estas tre malfacila tasko. Oni ne havas precizajn datojn, ĉar la ekonomoj neniam studis tiun fakon.

Tamen estas tre klare, ke la komunikado ludas tre gravan rolon en ekonomio. Se la komunikado estus malbona, la efekto estos negativa.

Ni provos fari ĉi tie tion :

Laŭ EU fontoj ni havas la informon, ke 11 procentoj de malgrandaj kaj mezgrandaj firmaoj perdis klientojn pro lingvaj kialoj. Reale tiu numero devas esti pli granda, ĉar neniuj konfesos volonte tion, kaj neniuj fanfaronos pro tio! Plej ofte oni ne scios ion ajn pri tio. Ĉu ne?

En EU la malgrandaj kaj mezgrandaj firmaoj prezentas ĉirkaŭ 66 procentojn de nombro de la firmaoj. Tamen ili estas tre gravaj por la Eŭropa ekonomio.

Se ni akceptos la Eŭropan enlandan malnetan produkton MEP ĉirkaŭ 13 mil miliardoj de eŭroj, (13 trilionoj) ni ekhavigos mil miliardojn da eŭroj.

Ĉar Eŭropo havas nun kvin cent milionojn da loĝantoj, tio faras 2000 eŭroj por ĉiu eŭropano por jaro.

Ni povas esti certaj, ke tiu sumo estas minimuma, ĉar 11 procentoj estas minimumo kaj ankaŭ grandaj firmaoj perdas komercan profiton pro lingvaj kialoj.

Se ni akceptos, ke lingvaj komunikad-kostoj faras ĝenerale nur dek procentojn de la Eŭropa malneta produkto, tio faras ankaŭ ĉirkaŭ mil miliardojn de eŭroj (unu triliono eŭroj).

Se ni komparos la Usonan enlandan malnetan produkton je kapo kun la eŭropa MEP, ni vidos, ke la eŭropa numero estas je 57 procentoj malpli granda ol la Usona.

Eĉ se la suma diferenco certe ne estas kaŭzita nur per lingvaj kialoj (ekzemple Eŭropa sociala sistemo kostas multe kaj malaltigas la ekonomian efikon), tio mem montras, ke la lingvaj nekomunikad-kostoj povas esti pli grandaj.

Ĝia valoro povas esti situata inter dek ĝis kvindek procentoj de la Eŭropa MEP. Tio estas tre grandaj sumoj. Surprize neniuj prizorgis tion. Niaj politikistoj zorgas pri etaj problemoj kaj la grandegajn ili ne vidas !

La brusela estraro diras, ke lingvaj kostoj por tradukoj estas nur 2,3 (du komo tri) eŭroj por persono.

Vi vidas mem, ke tio ne estas reala.

Ankaŭ laŭ EU fontoj la eŭropaj patentaj kostoj estas 27-oble pli grandaj, ol la kostoj de la Usona patento kaj 13-oble pli granda, ol la kostoj de la Japana patento. La ekstreme grandaj EU-patentaj kostoj estas direkte kaj nedirekte konektitaj kun la granda amaso de la uzataj lingvoj.

En la aktuala glob-monda ekonomio tre facilaj teknologioj iras for Eŭropo. Ni povos sukcesi nur kun tre modernaj produktoj, kiuj havas altan sciencan kaj teknikan valoron. Tiaj produktoj kaj teknologioj necesas patentajn defendojn. Altaj patentaj kostoj ege limigas la ekonomion.

Grandaj elspezoj de firmaoj dum merkato kaj propagando de produktoj.

Kiel konate, la merkataj kostoj estas ofte pli altaj ol la kostoj produktadaj. Merkato postulas akiradon kaj transdonadon de informoj en granda skalo. Temas pri tre intensa komunikado. Enkadre de EU ekzistas tia informo devige en multaj lingvoj samtempe, ĉar la merkatoj troviĝas en landoj kun diversaj lingvoj.

Starigi bone elspezitajn kostojn estas tre malfacile. Ekz. en la farmacia industrio la elspezoj por enkonduki unu novan medikamenton estas proksimume dekoble de kostoj por esploro kaj evoluigo. En aliaj fakoj eble estas ankaŭ grandaj sumoj.

La grandaj kostoj de dokumentaro pro produktaro malaltigas la konkurencokapablon de Eŭropaj firmaoj.

Laŭ direktivoj de EU necesas liveri al ĉiu aparato instrukciojn en la lingvo de la celata lando. Tio kaŭzas, ke malgrandaj kaj mezgrandaj firmaoj praktike ne povas entrepreni en certaj fakoj. Ekzemple la malgranda firmao produktas 20 diversajn laboratoriajn aparatojn. Instrukcioj por uzado estas averaĝe 20-paĝa kajero. Sume 400 paĝoj. Traduko al 23 Eŭropaj lingvoj konsistas el 9200 paĝoj. En Ĉeĥio tio kostas minimume 1000 kronojn por paĝo. Do por kovri la tutan eŭropan merkaton necesus 9,2 milionoj de kronoj.

Evidente tia ŝarĝo estus por malgranda firmao likvida kaj por mezgranda - vojo al perdoj. Usona firmao en ĉiuj kvindek ŝtatoj de Usono ne havas tiun ĉi problemon kaj la instrukcioj ĝin ŝarĝos 23-oble malpli ol Eŭropan firmaon. Simile facilan situacion havas firmaoj en grandaj enlandaj merkatoj de Japanio aŭ Rusio. Ankaŭ necesas aldoni propagandajn afiŝojn kaj fremdlingvan korespondadon.

Eŭropa firmao similas al punito, kiu trenas ne unu, sed 23 katenglobojn alligitajn al siaj piedoj. La moviĝo antaŭen estas malfacila.

La altaj kostoj pro ne direkta provizado

En nia familia firmao «Lambda laboratory instruments» ni havas spertojn, ke se ni aĉetas la materialojn kaj partojn direkte ni povas pagi malaltajn prezojn. Ekzemple eksterlande ni povis aĉeti elektronikajn detektorojn 3-oble malplimultekoste, ol en propra hejma lando.

Ni bezonis etajn metalajn tubojn. Hejmlande ili kostas dek foje pli ol en eksterlando. La personoj, kiuj ne scias komuniki en eksterlando, aĉetas multe pli kostajn materialojn. Iliaj produktoj havos sekve pli multekostajn prezojn kaj oni ne povos vendi ilin Tio havos certe egajn ekonomiajn sekvojn por la firmao kaj la lando.

Instruado de fremda lingvo kostas eŭropanojn multe da mono kaj tempo

Deviga instruado de fremda lingvo:

Ĉiuj eŭropaj ŝtatoj (escepte de Britio kaj Irlando) intense subtenas instruadon de unu aŭ de pluraj fremdaj lingvoj en baza kaj progresiva ŝtupoj de instruado. Averaĝe oni investas ĉirkaŭ 10-15 procentojn de la tuta lerneja frekventado por fremdlingva instruado. Al tio respondas ankaŭ kostoj liberigitaj de la ŝtatoj por ĉi tiu celo enkadre de ĝenerala klerigado. La ĉefaj lernantoj tiel forkonsumas dum lerneja frekventado ĉirkaŭ 550 lecionojn por instruado grandparte de la angla. Tio respondas al 11 procentoj de la suma nombro de instruhoroj.

Propravola instruado de fremda lingvo:

Apud la deviga lernado multaj homoj lernas lingvojn en privataj lingvolernejoj. En Ĉeĥio kun 10 milionoj da loĝantoj la interreto indikas 943 lingvolernejojn, kiuj proponas 3196 lingvokursojn Apud la deviga lernado multaj homoj lernas lingvojn en privataj lingvolernejoj. Do la reala kvanto estos ankoraŭ pli granda. Malpreciza pritakso - laŭ nombro de instruhoroj kun averaĝa prezo 100 kronoj por unu instruhoro - donas elspezojn de ĉirkaŭ 1 miliardo da kronoj jare. Rekalkulante la kostojn por la tuta EU, ni ricevas sumon 50 miliardojn eŭrojn jare. Ĉar la prezo de instruhoro estas en najbaraj ŝtatoj pli alta, la vera sumo estos verŝajne ankoraŭ pli granda. Sume kun ŝtataj elspezoj tio faras minimume 105 ĝis 135 miliardoj da eŭroj ĉiujare. La bilanco estus ankoraŭ pli grava, se oni aldonus la valoron de perditaj laborhoroj.

Ni ankaŭ devas vidi, ke la tempo uzata por studado de fremdaj lingvoj ne povas esti uzata por edukado de aliaj scioj bezonataj por la fakuloj. Ni

ankaŭ devas vidi, ke la tempo uzata por studado de fremdaj lingvoj ne povas esti uzata por edukado de aliaj scioj bezonataj por la fakuloj.

Kursoj financataj de firmaoj:

Multaj firmaoj financas lingvokursojn por siaj dungitoj. Ili prizorgas tiamaniere pli altan laborefikon de la dungitoj. Kiom kostas tiaj kursoj, estas malfacile diveni. Ĉi tie temas ne nur pri la prezo de la instruado mem, sed ankaŭ pri perditaj laborhoroj, neuzitaj por la aktiva laboro.

Malalta efiko de elspezitaj kostoj:

Oni supozas, ke sesjara infano estas laŭvorte trempita en la gepatra lingvo post 13 000 horoj. Patrino, patro kaj la tuta familio, amikoj, infanĝardeno kaj la ĉirkaŭaĵo certigas praktikan ekzercadon kaj tujan korektadon de eraroj. Ĉio okazas en tia intenseco, al kiu neniuj kurso kapablas proksimiĝi.

Ĉiutaga uzado de la gepatra lingvo malhelpas forgesadon kaj certigas transiron el pasiva uzado al la aktiva. Malgraŭ tio la infano ne scias legi, skribi, tiom malpli lerni laŭ tekstoj. Utilan scion de fremda lingvo eblas akiri proksimume post 2000 horoj da studado. Eĉ poste la scio estas malproksima al la kvalito komparebla kun la gepatra lingvo. Ĉe kutimaj 2 lecionoj semajne necesus kurso daŭranta 25 jarojn.

Tre bona posedo de fremda lingvo respondas al universitata studado.

Abiturienta scio de fremda lingvo estas, kiel konate, ne tro bon-kvalita. Tial la lingvoj ĉiam estas studataj ĉe universitatoj. Se oni komparas la tempon de prelegoj kun la tempo necesa por perfekta posedo de lingvo, respondas la klopodo al traĭro de ĉiuj universitataj studjaroj. Altnivela lingvoscio (kaj tamen ne samkvalita kiel la patralingva) estas kutime studata ĉe filologiaj fakultatoj. Kreskas la elspezitaj kostoj, flanke de la ŝtato same kiel flanke de la studento.

Teni la aktivan lingvoscion bezonas tutvivan uzadon kaj ekzercadon. Laŭ novaj esploroj la virinoj diras tage meznombro 16000 vortojn. La viroj ĉirkaŭ 15000 vortojn. Tio estas tre granda nombro, kiu montras la grandan intenson kun kiu ni uzas la gepatran lingvon. Ĝi estas necesa por konservi nian lingvon je alta kvalito. En mala kazo la aktiva scio transiras al la pasiva kaj malaperas preteco tuj reagi, kaj riĉeco de la vortprovizo. Por teni plurajn lingvojn necesas la klopodon multoblige.

Pro tiu okazo ni ne povas lerni alian lingvon tiel perfekte, kiel nian denaskan lingvon.

Tradukado ne estas solvo

Tradukado estas multtekosta kaj temporaba.

La oficoj de EU en Bruselo bezonas 4000 tradukistojn kaj interpretistojn. Tio kostas ĉirkaŭ 1,2 miliardojn de eŭroj jare. Sed tiu sumo estas evidente subtaksita. Paradokse - pro siaj sekvoj - la plej multtekosta povas esti netradukado de gravaj informoj, kio pro komplikaĵoj, tempomanko kaj kosto de tradukado certe okazas.

Tradukado ne eblas ĉiam kaj ĉie!

Persona homa kontakto ĉiam estis kaj estos en certaj kazoj nesubstitebla. Ekzemple kunlaboro de du firmaoj, se ĝi estu efika, postulas krei klimaton de reciproka fido inter la gvidantoj de la du firmaoj. Tia rilato ne estiĝas ĉirkaŭ la tablo de traktado. La intimiĝo okazas kutime dum firmaaj vespermanĝoj aŭ bankedoj, kie ĉe manĝado kaj trinkado oni babilas pri nefakaj aferoj kaj la reprezentantoj de ambaŭ flankoj iom-post-iome amikiĝas. Nur poste, surbaze de akiro de persona ekkono kaj akiro de reciproka fido, oni multe pli facile traktas pri komercaj aferoj. Tiuj ĉi spertoj, kvankam nekonataj al la publiko, estas tute esencaj.

Imagu, ke tia kontakto pro la lingva nescio devus realiĝi pere de interpretisto. La atendata pozitiva rezulto estus absurda kaj kompreneble fiaskus.

Rezulto estas nefikso de kunlaboro, perdo de negoco, nerealigo de novaj projektoj.

Tio senpere rilatas al nealtigo de enspezoj, nealtigo de profito, nekreo de novaj laborlokoj, ne enkonduko de novaj produktoj aŭ teĥnologioj. La sekvojn de nesukcesaj traktadoj neniu kalkulos. Neniu el la traktantaj flankoj havas intereson nek eblon pritaksi tion, kio ne ekzistas.

Sed ke gravaj projektoj ne realiĝas pro nescio aŭ nesufiĉa scio de lingvo, estas ekster ĉia dubo. La konkurencokapablo de la Eŭropa ekonomio kompreneble tre suferas pro tio.

Ankoraŭ pli malbona situacio estas ĉe internaciaj politikaj traktadoj. La historio montras multajn ekzemplojn de sensukcesaj traktadoj kaj de gravaj sekvoj, kiuj dum tio rezultis.

Ŝtata traktanto sen perfekta lingva scio traktas malpli avantaĝajn kondiĉojn.

Kiu prijuĝos, kiom da ŝancoj estis vanigitaj ĉe traktado de nesufiĉe lingve kompetentaj traktantoj? Estas konate, ke nesufiĉa lingva scio malaltigas la kapablon bonkvalite trakti kaj konvinki la kontraŭan flankon pri propra profito. Tia traktanto kompreneble hontas pro sia nesufiĉa lingva esprimado, tial li volonte kapjesas por kondiĉoj ne optimumaj.

La nacio pri tio kompreneble nenion ekscios kaj la pritrakitaj kondiĉoj estas prezentataj kiel la maksimume atingeblaj. Kiom da neavantaĝaj kontraktoj Ĉeĥio jam subskribis pro ĉi tiu kialo?

Kaj kiajn sumojn perdas la civitanoj ĉiutage pro tio? Antaŭ la foriro de eŭrokomisaro V. Špidla al Bruselo lia edzino deklaris: „Vladimir la anglan ellernos dum kvin monatoj!" Tio nur pruvas, ke eĉ inter altaj sociaj tavoloj oni absolute ne komprenas la lingvan problemon.

Fatala neuzo de ŝanco?

Ĉu la kvanto de lingvoj neniigos la historian ŝancon de Eŭropo?

La duonjarcento investita en unuigadon de eŭropaj nacioj alportis unikan situacion. Eŭropo kun sia duonmiliardo da homoj fariĝis giganta potencialo.

Ankoraŭ neniam en la historio oni sukcesis efektiviĝi kunlaboron inter tiom da nacioj sur teritorio etendiĝanta de Atlantiko ĝis la eksa Sovetunio kaj de la norda polusa cirklo ĝis la marbordo de Afriko. Per la nombro de loĝantoj EU superas je duono la nombron de la usonanoj kaj preskaŭ kvaroble la nombron de la japanaj loĝantoj. Laŭ la tuta malneta enlanda produkto (MEP) ĉirkaŭ dek du mil miliardoj da eŭroj (12 trilionoj eŭroj en 2007) EU superis MEP de Usono kaj fariĝis la plej granda ekonomio de la mondo (kvankam laŭ rekalkulo je kapo ankoraŭ eĉ proksimume ne).

Eksterordinara potencialo kuŝas en la klera populacio, kiu havas historian tradicion en plejparto da fakoj de homa agado. Ankaŭ la infrastrukturo estas je bonega kaj ofte je la plej bona nivelo en multaj fakoj.

Ĉu io malhelpas utiligon de tiuj ĉi kvalitoj? Jes! Granda problemo estas troa lingva diverseco de eŭropaj nacioj, kiu kaŭzas neefikan komunikadon kaj bremsas la necesan kunlaboron kaj interŝanĝon de informoj.

KION FARI?

La pasinta ĉeĥa prezidanteco en EU povis esti utiligita por enkonduki komunan eŭrolingvon Esperanto en la vivon. Ĉeĥio povis pricerbumi kaj

proponi efikajn vojojn, kiel la komunan lingvon kiom eble plej baldaŭ kaj efike enkonduki, same sur nivelo centra kiel sur nivelo nacia.

La ĉeĥa registraro faris nenion utilan en tiu direkto kaj la ŝanco estis perdita.

Tamen multaj ebloj ekzistas:

- enkonduko de Esperanto kiel plua unia lingvo ekvivalenta al la grandaj lingvoj
- enkonduko de eduksistemo de Esperanto en ĉiuj ŝtatoj de Eŭropo
- enkonduko de interreta televido esperantlingva kun informoj pri EU kaj aliaj interesaĵoj
- staĝo de instruantoj de Esperanto por junularo kaj plenkreskuloj
- interŝanĝaj tendaroj por gejunuloj kun instruado de Esperanto
- enkonduko de teamoj de fakuloj por kompletigi mankantajn esprimojn precipe en la sciencaj fakoj

Ankoraŭ multaj aliaj ebloj estas troveblaj.

Ĉu la angla lingvo estas bremsilo de progreso?

Por serĉi informojn en la interreto oni hodiaŭ uzas ŝlosilajn vortojn, kiujn oni metas en guglon (en:Google), aŭ en alian serĉilon. La sukceso estas principe influita de elekto de la ŝlosilaj vortoj. Sed ankaŭ tiam aperas multe da nekonvenaj referencoj (tiel nomataj hitoj) kaj post la unuaj dek paĝoj la serĉado finiĝas.

Tiu ĉi vojo jam hodiaŭ la serĉadon praktike malebligas. Kiel la multo da informoj kreskos (kaj la kresko estas eksponenciala), la problemoj de serĉado estos pli kaj pli malbona. Ekestas do nepre neceso de serĉado laŭ la senco, aŭ laŭ la baza, eventuale ankaŭ laŭ la komplementa ideo. Tiu ĉi vojo poste malfermos la vojon al artefarita inteligenteco.

Artefarita inteligenteco montriĝas kiel unusola vojo por efika solvo de tutmondaj problemoj, precipe en scienco kaj teĥniko.

Jam de longe ne plu estas por hodiaŭa homo eble enkapigi multegan kvanton da informoj kaj scioj, kiuj necesas por solvado de principaj problemoj de la homaro. Jen nur kelkaj ekzemploj: Dum jardekoj daŭras nekapablo de solvo transformi sunlumon al elektro, kio estas evidente rezulto de nekomprene

de komplikaj interrilatoj en tiu ĉi faka kampo. La samo validas por fuelpiloj, kuracado de karcero, aŭ kuracado de aidoso. Tiajn ekzemplojn oni povus trovi multe. Ilia solvo ŝovus nin tre signife antaŭen.

La kondiĉo por sukcesi estas esprimi pensojn kaj faktojn kun preskaŭ matematika precizeco kaj unusignifeco, por ke ili estu prilaboreblaj per komputilo. Tia lingvan kvaliton havas esperanto, sed en neniu kazo la angla, plenplena da historia balasto. La angla lingvo estas ekstreme polisemia. Ekzemple ĉiu el mil plej uzataj anglaj vortoj havas meznombro dudek sep vortsignifojn. Pro tio la angla lingvo ne povas esti efike uzata por la internacia komunikado.

Por tio kaj multaj aliajn kaŭzojn la angla lingvo estas fakte bremsado de progreso.

Al la nova Eŭropa mono apartenas ankaŭ nova eŭropa lingvo!

Ne estas sen intereso konstati, ke politikistoj dum elekto de komuna eŭropa mono ne prenis unu el la naciaj monoj, ekz. la britan pundon, sed ili elektis tute novan monon? Kaj la komunikado estas multe pli grava. **Komuniki sen mono eblas, sed uzadi monon sen komunikado ne eblas!**

Esperanto estas bona investaĵo.

Dum 120 jaroj sindonaj esperantistoj klopodas disvastigi sian duan lingvon en la nomo de humaneco, frateco, amo kaj paco. Sed la ĉefa motivo por enkonduko de esperanto en nuna Eŭropo estas pure ekonomia. Esperanto estos certe enkondukita, post kiam la potenculoj ekkonscios, ke esperanto estas vere bona investaĵo! Ĉu jam hodiaŭ ne estas klare al ĉiuj, ke sen komuna lingvo ni en Eŭropo ne interkompreniĝos? Esperanto estas sendube la plej bona solvo.

Ĉu la enkonduko de komuna lingvo estas malavantaĝa por la anglosaksaj landoj?

Ĝi povas ŝajni paradokse, sed ne. Estas ja avantaĝo komuniki kun naŭdek procentoj da potencialaj klientoj anstataŭ nur kun la dek procentoj!

Pli ol naŭdek procentoj de ĉiuj informoj en la reto estas anglalingvaj. Tio signifas, ke ĉi tiujn informojn liveras sole homoj, organizoj kaj ŝtatoj, kiuj la anglan posedas. Sed tio estas maksimume 10% de la monda populacio.

Sekve la informoj en la angla estas por 90% da teranoj ne alireblaj. Aliflanke por la parolantoj de la angla estas informoj de la 90% da homaro same ne alireblaj. Por la tuta homaro ĝi estas granda domaĝo, ĉar ankaŭ la

neparolantoj de la angla estas kapablaj, kleraj, inteligentaj kaj saĝaj ... Ke la komerco suferas oni ne necesas aldoni.

Se oni enkondukus amase la facilan komunan lingvon esperanto ĉiuj informoj fariĝos alireblaj por ĉiuj, do ankaŭ por la parolantoj de la angla.

Mi ne volas kritiki la anglan lingvon. Mi ĉiutage uzas anglan kaj plurajn aliajn lingvojn kaj mi lernis multe en la 50 pasintaj labor-jaroj de mia vivo.

Mi volas nur montri, ke ni havas egan problemon en komunikado, kaj ke tio havas egan ekonomian sekvon.

Se ni ne solvos ĝin efike, ĝi povos havi fatalan sekvon por ni ĉiuj.

Brig, 16-a de Julio 2009

Vortoj de Tomáš Baťa

ĉeĥa sukcesa ŝuindustriisto, pioniera kapitalisto, el la jaro 1932

Tio, kion oni nomas kutime ekonomia krizo, estas alia nomo por morala mizero. Morala mizero estas kialo, ekonomia bankroto estas sekvo. En nia lando multaj homoj opinias, ke ekonomian krizon oni povas sanigi per mono. Mi timas la postsekvon de tiu eraro. Ni nun bezonas neniajn geniajn turniĝojn kaj kombinaĵojn. Ni bezonas moralan starpunkton al homoj, al laboro kaj publika posedaĵo.

Ne subteni bankrotulojn, ne aranĝi ŝuldojn, ne malŝpari valoraĵojn kontraŭ nenio, ne ĉantaĝigi laborantojn, ni faru tion, kion nin levis el postmilita mizero.

Labori kaj ŝpari kaj taksu laboron kaj ŝparadon pli prosperajn kaj volontajn, pli honorajn kontraŭ pigrado kaj disipo.

Vi pravus, oni devas superi krizon de fido. Sed per teknikaj manipuladoj financaj tion oni ne povas. La fido estas persona eco kaj fidon oni povas krei nur per morala starpunkto kaj per persona ekzemplo.

Oni ne bezonas ion aldoni...

ODO PRI SKOKOVY

Čestmír Vidman + Jaroslav Krolupper

Ni jam konas ĉeĥojn kaj moravianojn
Estis tie tamen multe pli da gentoj
Rememoru ni modestajn skokovanojn
Jen paŝtiĝas tie da ĉevaloj centoj

Ĝoje ja ĉi tie ĉiuj pulmoj spiras
en aero freŝa de la Paradizo
Tien ĉi kondukas ankaŭ Lakta Vojo
Kaj turistoj tie pri ripozo, ĝojo
ĉiam antaŭĝojas, pensas eĉ sopiras

En la pensiono – Espero nomiĝas –
ĉiuj certe trinki povas kaj varmiĝas
ne nur per satiga kaj abunda manĝo
sed eĉ pri specifa de parol‘ aranĝo

Homojn el la mondo eblas tie vidi
Unu lingvo ĉiujn firme tie ligas
kaj mastikas
Ĉiu tie povas lerni eĉ ekridi

Ĉiu povas alrapidi
al la lingvoparadizo

Tie ĉi kunvenas ĉiuj aŭ kosmanoj
aŭ marsanoj, venusanoj
jupiteranoj, saturnanoj
ĉiuj foraj galaksianoj

Kaj ĉiuj laŭdas
(ĉiuj, kiuj rigardas, aŭdas)
bonhumoron kaj gastigon
de ĉi tiu domo.

Oni devas ja ankoraŭ fini
la observatorion
Mi salutas karajn ĉielanojn

kaj kun nostalgio
ankaŭ skokovanojn

En la nomo de teranoj
Ĉestmír Vidman**IO**
(Ne gravas
oni povas
kaŝi tiun **IO**
Finiĝas la fol**IO**
relegu ĉ**IO**n
ree dekomence)



SKOKOVY

Pentraĵo de Blanka Zubová

ENHAVO

Aŭguraĵo
Pura amo
Gŭanehej kaj Gŭagŭan, kuba popola, M.Bacev
Konsilo bona, ĉiam bonvena
Svede kaj eksterlande, Siv Burell
Cerbaj impulsoj, Dinko Matkoviĉ
El la libreto „Monatoj tra la mondo“
Junulino sur la luno, ĉuvaŝa popola fabelo
Finfine aperis serioza argumento kontraŭ la angla
Malfideleco? Benjamin Kuras
Klepsidro
Ĉefuloj kondukas kiel ĉimpanzoj
Pakumoj, pakumoj, pakumoj... J.Drahotová
El la libro „La skandalo pro Jozefo“ V.Vinař
La Monujo, Maŝado de Asizo
La vizo, Tereza Kapista
De buŝo al buŝo, Adri Pásztor
Miksitaĵoj, Kerstin Rohdin
El vidpunkto de Helena Maudrová
Paradizo aŭ Infero, Nguyen Xuan Thu
Portreto, Olga Glendová
Aforismoj, Patricie Holečková
Po-signo
Indianaj ĉifroj, Marie Homolová
Esperanta kato, Jaroslav Krolupper
Urĝa helpo, Pavel Tomeš
Kio estas homa feliĉo? Míla Tomášová
Anekdotoj el interreto
Du poemetoj, Heléne Caous
Ĉe la lago prokaine de Kaposvar, B.Kovacs
Pentekosto, Béla Kovací
Ludoj kun diablo
Intervjuo kun edzo de esperantistino
Intervjuo kun edzino de esperantisto
Pripensinda... Ilona Böde
Gaŭĉaj popoldiroj
En Ĉeĥio finis lekado de poŝtmarkoj
Ina vilaĝo jam ekzistas
Ĝenoj kaŭzitaĵoj de la koboldo „SE“, J.Drahotová

Ĉeĥa gramatika furoro „Gendera problemo“ J. Drahotová
Kio/kiu estas la tiel nomata „Dio“?
Kiel kreĝis la universo?
Pri naciismo, Milan Augustin
Baza problemo de la E-movado, Zlatko Tišljar
Lingva politiko en eŭropa Unio, Jozef Reinvart
Ekonomiko malsanas pro neefika komunikado, P. Lehký
Vortoj de Tomáš Baťa
Odo pri Skokovy, Ĉestmír Vidman+Jaroslav Krolupper

